

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Jubileoj kaj datrevenoj
UEA omaĝis al Lapenna
Tra Esperantujo
Eŭropo havas ĉefon
Kiel oni skribu niajn
ĉapelitajn literojn?
Promenante en la unua
Esperanto-urbo
Ryszard Rokicki pri la
akcento en kunmetitaj
vortoj
Nia poezio: Poemoj
de Jorge Camacho
El “Mia Jarcento”
de Günter Grass
Sergio Pokrovskij pri
“Sen titolo” de Ŝirjajev



2010

1

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2010. №1 (183)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefona (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2010

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 700 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2010, №1 (183).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 14 декабря 2009 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Redakcie

Antaŭ unu jaro ĉi tiun kolumnon komencis la konata Aŝerco pri la rilatoj inter la jaroj antaŭa, kuranta kaj venonta, laŭ kiu la sekva jaro ĉiam estos “meza”, t.e.: pli malbona ol la antaŭa, sed pli bona ol la postsekva. Se oni taksas la revuojn, laŭ la evoluo de la abon-kvanto, la pesimisma ŝerco realiĝis, ĉar post la rekorda jaro 2008a nia abonantaro falis preskaŭ al la nivelo de la “malgrasa” jaro 2007a. La nuna abonkampanjo montras, ke la malkresko daŭras — aĉeto de kulturaj varoj ne estas prioritata en la cirkonstancoj de la ekonomia krizo.

Sed, se oni taksas la revuojn laŭ la legindeco, la jaro estis pli ol “meza”. Pluraj el vi ŝatis la kontribuajojn pri la jubilea kongreso en Bjalistoko, kiuj aperis antaŭ, dum kaj post la kongreso. Kaj precipe multajn laŭdojn ni ricevis pro la materialo publikigita okaze de la 150a naskiĝdato de Zamenhof.

Ĉi-jare ni, kvankam iom malpli ofte, daŭrigos la zamenhofologian temaron, kaj jam post unu monato vi legos novajn informojn pri la patro de *nia* Ludoviko, Mark Zamenhof, kiujn la redaktoro de *La Ondo* trovis en arkivaj dokumentoj. Cetere, via redaktoro rakontos pri sia laboro en la “deviga” venont-numera intervjuo, kiel la Esperantisto de la Jaro 2009. En februaro vi retrovos pliajn tradiciaĵojn: la rezultojn de *Liro* kaj de la Internacia Fotokonkurso, kaj la statistikon pri la libroeldonado en Esperantujo.

Sed vi trovos en la revuo ankaŭ novajn rubrikojn kaj novajn temojn en la malnovaj rubrikoj.

Post la pasint-jara rakontado pri siaj propraj projektoj, Esperanto@Interreto ĉiumonate prezentos pli vastajn prikomputilajn temojn. Ĉi-foje lernu pri la tajpado de la literoj Esperantaj en la ordinara komputilo, kaj poste vi legos respondojn al aliaj demandoj, ekzemple: Kiun retumilon uzi kaj kial? Kiuj Esperanto-retejoj meritas nian atenton? Kiel pli efike uzi sian komputilon kaj Interreton por Esperantogado? Kiel protekti sin kaj sian laboron?..

En *Nia trezoro* vi konatiĝos kun la plej gravaj romanoj verkita en Esperanto. La romanoj estas elektitaj per reta konsultado de elstaraj fakuloj pri la Esperanta literaturo.

Poezion vi trovos en ĉiu numero, ĉar, krom la *Rusa Antologio*, kiun ĉiun trian monaton pretigos Valentin Melnikov, regule aperos *Nia poezio*, kies rubrikestro István Ertl premiere proponas poemojn de Jorge Camacho.

Legu do... Ni **ne** ŝanĝis la abontarifon (escepte de Ruslando, pro la senvaloriĝo de la rublo). Tio iĝis ebla danke al du malvaraj amikoj (el Eŭropo kaj el Azio), kiuj pagis, en la formo de “dumvivaj abonoj”, konsiderindan sumon kiu helpas la aperadon de la revuo almenaŭ dum du jaroj. Ni kore dankas ĉi tiujn amikojn, kiuj modeste decidis resti anonimaj. Ni dankas ĉiujn, kiuj reabonis kaj reabonos, kaj kiuj kun sia kotizo sendis kaj sendos kontribuon al la *Abonhelpa Fonduso* kaj al la fondaĵo *Amiko*. Ni esperas, ke vi restos kun *La Ondo* en la nova jaro.

Gajan Kristnaskon!

Bonan novan jaron 2010!

HaGo

AIKo

Sur la kovrilpaĝo estas foto de Bang Jee-young (Koreio), kiu ricevis la 3an premion en la 11a Fotokonkurso.

Dat-revene kaj rememore

Feliĉa estas, kiu kun plezuro
Parolas pri la patroj, kiu ĝoje
Rakontas pri iliaj grandaj agoj
Kaj en la fino de la bela vico
Sin mem fiere vidas.
(*Ifigenio* I, 3)

La jaro 2009 staris plene sub la signo de la 150-jara dat-reveno de la naskiĝo de Lazar Markoviĉ Zamenhof. Ĉi dat-reveno konsciigis, ke eĉ 92 jarojn post la morto de Zamenhof multaj detaloj el lia vivo restas nekonataj kaj eble, pro manko de dokumentoj, neniam plene klariĝos. Kio validas por li, tio validas eĉ pli por lia vasta familio, por lia bofamilio Silbernik kaj en mezuro eĉ pli granda por la pli-multo el la historiaj figuroj de la Esperanto-movado kaj ŝuldiĝas al ia konscio-manko kaj kultura vakuo ĉe multaj esperantistoj. Pacienca edukado kaj rekonsciigo pri dat-revenoj tro ofte silente forgesataj eble povos plibonigi la situacion. Ĝis nun neniu kompilis *Ĉiaman Memor-Kalendaron* en kiu oni facile trovus la datojn de naskiĝo kaj morto de la plej gravaj esperantistoj kaj de adeptoj de aliaj plan-lingvoj, same kiel historiajn eventojn. Jen alia tasko kiu povus logi eĉ historie interesitan amatoron...

2010 retrovagigu la rigardon al kvar jaroj de la paseo: al 1960 (50 jaroj), 1935 (75 jaroj), 1910 (100 jaroj) kaj 1860 (150 jaroj). Jen kelkaj sondoj al la paseo.

1960

La 50-jaruloj de 2010 festu. La 45a UK okazis en Bruselo. En tiu jaro niajn vicajn forlasis: Stellan Enghom (01-25), Carl Barthel (02-12), Henriko Fisher (02-13), K.R.C. Sturmer (03-18), František Omelka (06-23), Max Butin (07-21), Giorgio Canuto (10-29), Antonio Paolet (12-17) kaj certe multe da forgesitoj... Retrospektive, la jenaj verkoj aperintaj en 1960, meritas atenton ĝis hodiaŭ: el la originalaĵoj: *Unufingraj melodioj* (Auld), *Koloroj* (Baghy), *Vitralo* (Francis), *Pinta krajono* (Rossetti), *Nur tri kolorojn* (Urbanová); el la tradukoj: *Otelo* (Shakespeare/Rossetti) kaj la

Zamenhof-biografio de Boulton — kun la escepto de Baghy ĉiuj STAFETO-eldonoj.

1935

La UK okazis en Romo. Inter la libro-eventoj de la jaro estis: *Dekdu Poetoj*, *Sur sanga tero* (Baghy), *Verkoj de Fez* (Felikso Zamenhof) kaj *Interpopola Konduto* (Privat) sur la kampo originala, dum inter la tradukoj rimarkindis: *Ĉeĥoslovaka Antologio* kaj *Vivo de Arnaldo* (Mussolini/Kalocsay). Inter la nefikciaĵoj debutis *Plena Gramatiko de Esperanto* (Kalocsay/Waringhien)...

Mortis: Gaston Moch (?), Louis de Beaufront (01-08), Arnold Behrendt (02-24), Heinrich Arnold (10-10), Charles Richet (12-04) kaj naskiĝis: Vlastimil Novobilský (02-15), Tacuo Huĝimoto (06-29), Hermann Behrmann (07-12)...

1910

La jaro 1910 spertis i.a. la unuan Katolikan Esperanto-Kongreson kun la fondiĝo de IKUE en Parizo, la unuan UEA-kongreson en Augsburg kaj la 6an UK en Vaŝingtono.

La libro-merkaton markis *La logika bazo de la vortfarado en Esperanto* per kiu René de Saussure lanĉis la principon de neceso kaj sufiĉo. Beletre la jaron distingis: *Marta* (Orzeszko/Zamenhof), *Patroj kaj filoj* (Turgenev/Bein). Charles Verax aperigis sian *Enciklopedia Vortareto Esperanto*.

Forpasis: Lev Nikolajeviĉ Tolstoj (11-20) kaj Paul Berthelot (11-02), en la mondon venis... Mario Dazzini (?), Willem P. Roelofs, Hendrik Arie de Hoog (03-24), W.J.A. Manders (04-24), Emilija Lapenna (05-09), Nikolajs Ķūrzēns (06-25), Brian Price Heywood (10-01), Frederik Skeel-Gjöring (10-14), Karl Schulz (11-26).




1860

En 1860-01-10 August Theodor von Grimm (vd. p. ??) verkis sian programon de plan-lingvo longe antaŭ ol Schleyer kaj Zamenhof ellaboris siajn projektojn...

Naskiĝis: Otto Jespersen (07-11), Felicien Menu de Ménil (07-16), Paul Christaller (08-21), Aleksandr Dambrauskas (02-26).

Reinhard Haupenthal

La subajn librojn antaŭ 50 jaroj eldonis *Stafeto*. Ĉu iu nuntempa eldonejo aperigos ĉi-jare kvar librojn, pri kiuj historiisto fieros en 2060?



Omaĝe al Ivo Lapenna

La vivo kaj verkoj de Ivo Lapenna estis temo de la 31a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 28an de novembro. Tiu ĉi populara aranĝo okazis tri semajnojn post la centa naskiĝdatreveno de Lapenna (1909–1987) kaj allogis 120 vizitantojn el 16 landoj. S-ino Birthe Lapenna ĉeestis la Tagon kaj ricevis kiel memoraĵon enkadrigitan folion kun dek poŝtmarkaj portretoj de sia edzo, por rekompenci kun rento la portreton, kiun ŝi donacis al la Centra Oficejo en la Malferma Tago en aprilo 1998 okaze de la 90-jariĝo de UEA, klarigis la ĝenerala direktoro Osmo Buller.


La ĉefpreleganto estis prof. Carlo Minnaja, prezidanto de Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna. Li parolis en du partoj pri siaj renkontiĝoj kun Lapenna. Sian prelegon Minnaja ilustris per fotoj kaj filmfragmentoj. Li montris ankaŭ la Pokalon Ivo Lapenna, konservatan en la CO, sur kiu lia nomo estas gravurita kiel la unua post lia venko en la Oratora Konkurso en 1960. Pri siaj kontaktoj kun Lapenna parolis ankaŭ prof. Duncan Charters, vicprezidanto de ILEI, kiu aparte elstarigis lian atenton al la lerneja agado.

La publikon plene kaptis la frisa grupo *Kapriol'*, kiu krom mem kanti, kantiĝis kaj eĉ dancigis la publikon. Ĉeestis ankaŭ neesperantistaj popoldancistoj, kiuj en plezura maniero povis konatiĝi kun la Esperanta kulturo. Norberto Díaz kaj Yoandra Rodríguez portis salutojn el Kubo. Ili rakontis kaj respondis demandojn pri la preparado de la 95a UK en Havano. Katalin Kováts kaj Zsófia Kóródy disdonis atestilojn al trapasintoj de lingvoekzamenistaj kursoj kaj diplomojn al sukcesintoj en ekzamenoj laŭ la Eŭropa Referenckadro. Pri la lasta horo en la prelegejo respondecis ILEI, kies nova estraro kunsidis en Roterdamo ĉirkaŭ la Malferma Tago kaj ricevis okazon prezenti sin kaj siajn planojn.

Biblioteko Hodler funkciis kiel kin-ejo de dokumentaj filmoj. En la filmoj pri la UKoj en Budapeŝto en 1966 kaj Vieno en 1970 eblis vidi scenojn pri la oratoranta Ivo Lapenna. Scenojn el la Malferma Tago mem montris baldaŭ la Eduka Televido ETV, kies teamo filmis dum la Tago kaj intervjuis la CO-oficiston Ralph Schmeits por programo elsendota en la Roterdama regiono en januaro.

Bonan tagon spertis la Libroservo, kies vendoj sumiĝis je 2416,40 EUR.

GK UEA



Meksiko aktivas kaj rekordas

En la ĉefurbo de Meksiko 14–17 okt okazis la 6a Monda Kongreso de Junaj Sciencistoj, organizita de FISS — internacia organizaĵo, kiu apogas la sciencan kaj la kulturan. Representantoj de la Meksika Esperanto-Federacio (MEF) prezentis du prelegojn kaj duhoran kurseton en la kongreso, kiu okazis en la jura kaj medicina fakultatoj de la nacia universitato UNAM.

La universitato UNAM denove okazigos en januaro Esperanto-kurson en la ĥemia fakultato.

Intertempe novaj personoj aliĝis al MEF. Post la 6a Semajnfina Renkontiĝo Esperantista (Toluca, 28–29 nov 2009) la membraro de MEF superis centon kaj atingis novan rekordon: 103 membroj.

Martin Schäffer

UEA: la elektokampanjo startis

En 2010 okazos elekto de novaj gvid-organoj de UEA por la periodo 2010–2013. Parto de tio estos elekto de komitatoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatano B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM je la 31a de decembro 2009 oni elektos ses komitatanojn B.

Laŭ la Ĝenerala Regularo (art. 8), dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi unu solan kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn.

Kompletaj proponoj atingis la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo ĝis la 28a de februaro 2010. Validaj estos nur skribaj dokumentoj kun originalaj subskriboj (t.e. ne telefaksoj aŭ retmesaĝoj).

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum du jaroj antaŭ la elekto (t.e. 2008 kaj 2009) kaj resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis neniu komitatkunsidon en la periodo 2004–2009, ne estas reelektebla.

Se ne estos pli ol ses validaj kandidatoj, oni konsideros ĉiujn elektitaj. Se ili estos pli multaj, la individuaj membroj ricevos voĉdonilon por elekti siajn reprezentantojn per poŝta balotado.

Osmo Buller

Ĝenerala Direktoro de UEA

Aleksander Korĵenkov – la Esperantisto de la Jaro 2009

La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), kaj Ilona Koutny (2008).

En ĉi tiu jaro 16 kandidatigantoj proponis 24 kandidatojn, al kiuj 13 elektantoj jene donis la voĉojn:

Aleksander Korĵenkov	5 voĉoj
Probal Dasgupta	3 voĉoj
Peter Baláž, Barbara Pietrzak, Heidi Goes, Katalin Kováts, Anna Löwenstein, Floréal Martorell, Baldur Ragnarsson	2 voĉoj

Tri kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Aleksander Korĵenkov, Ruslanda ĵurnalisto kaj redaktoro, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2009 pro la ampleksa kaj zorga esplorado de la vivo, verkoj kaj ideoj de Zamenhof kaj pro tiutemaj verkoj kaj prelegoj, speciale pro la libro *Homarano*, aperinta ĉi-jare okaze de la 94a Universala Kongreso de Esperanto.

Halina Gorecka, sekretario

ALTE: denove duobla reprezento

En la 37a konferenco de Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE), kiu okazis 11–13 nov 2009 en Maynooth, Irlando, Esperanto estis duoble reprezentita. La subaj informoj estas prenitaj el la oficialaj komunikoj de la du respektivaj asocioj, kiuj ĉi-foje silentis pri la partopreno de la “alia flanko”.

Zsófia Kóródy estis reprezentanto de UEA en ĉi tiu konferenco kun la ĉeftemo “Testado de malpli parolataj lingvoj en multlingva kunteksto”. Nome de UEA Zsófia Kóródy transdonis al la ALTE-sekretario Martin Nutall ekzempleron de la libro *Esperanto de nivelo al nivelo*, kiu priskribas la postulojn de la nova UEA-ekzameno kaj donas modelajn testojn en la niveloj B1, B2 kaj C1. Ŝi transdonis al ALTE ankaŭ provexempleron de la ĵus ellaboritaj modeltestoj pri Esperanto en la niveloj A1 kaj A2 kaj la ĉi-jare akceptitan adaptan por blinduloj de la regularo de la komunaj UEA/ILEI-ekzamenoj.

Krom partopreni en la fakkunsidoj Zsófia Kóródy kontribuis ankaŭ al la laboro de la specialaj interesgrupoj. Unu el ili okupiĝas pri verkado de manlibro por akordigi ekzamenojn al KER, alia ellaboras rekomendojn por ekzameni infanojn kaj gejunulojn. La grupanoj kun intereso aŭskultis resumon pri la projekto *Springboard*. Kóródy aliĝis krome al la nova laborgrupo pri instruista trejnado kaj pluklerigado.

GK UEA

D-ro Giorgio Silfer kaj d-ino Meg Bianchi, kiel delegitoj de Kultura Centro Esperantista, partoprenis en la 37a konferenco de ALTE, specife en la fakaj laborgrupoj. Plej aktivaj laborgrupoj estis tiu pri la inspektora kodo kaj tiu pri la enmigrintoj.

La laborgrupo pri la inspektora kodo, kunordigata de d-ino Gabriele Kecker, analizis la lastan parton de la malneto redaktita en Berlino la lastan septembron. La laborgrupo pri la enmigrintoj, gvidata de d-ro Lorenzo Rocca, enfokusiĝis pri la problemoj de alfabetigo.

La konferenco proponis plurajn prelegojn, laŭ la ĉeftemo “Testado pri malpli parolataj lingvoj en multlingva kunteksto”, kiuj tamen ne multe rilatis al la ALTE-laboroj mem. Grandan spacon ricevis, en la lasta tago, la gaela lingvo.

HeKo



Miskolc: Esperanto konatigas kaj amikiĝas (Foto de ICH)

“Landoj kaj lingvoj” kunigas

Centoj da personoj — lernantoj, gepatroj, instruistoj — kunvenis dimanĉvespere en la orienthungara urbo Miskolc por ĝui prezentaĵojn de 7–9-jaraj infanoj el tri landoj, faritaj en kvar lingvoj. Tiu kvara lingvo estis Esperanto. La renkontiĝo okazis 17–20 okt pere de dujara projekto kadre de la programo *Komenio*, kiu celas akceli kaj subteni internaciajn lerneajn kontaktojn.

Lernejo Bar Hill apud Kembriĝo alportis al la aranĝo la anglan, lernejo Nicolai el Herzberg-am-Harz — la Esperanto-urbo la germanan, dum ĉe la gastiganta lernejo Komlóstető en Miskolc regas evidente la hungara.

Lernantoj unue kunvenis kadre de la projekto en Britio, nun estas la vico de Hungario, sekvas en la venonta printempo la vico de Germanio.

Gvidis la anglan grupon la vicdirektoro de la lernejo Sanjay Mistri, ilia Esperanto-instruisto Tim Morley kaj la klasinstruisto, Claire White. El Germanio gvidis Zsófia Kóródy kaj Otto Kern. La multjara instruisto de Esperanto en la hungara lernejo estas Ilona Fedor.

La direktorino de la gastiganta lernejo, Éva Farkasné Karres, dulingve bonvenigis ĉiun al la festa vespero. Post pliaj salutoj sekvis bunta prezento da kantoj, dancoj kaj aktorataj rakontoj, utiligante ĉiujn kvar lingvojn. Britoj invitis al dulingva kantado pri vivo en flava submarŝip’; germanoj vivigis temon pri sorĉistoj, kiuj havas reputacion prosperi en la Harzmontaro; hungaroj prezentis interalie la faman popolrakonton pri Lúdas Matyi.

La infanoj bone amikiĝis. Post kelkaj dancprezentoj oni invitis ĉiujn enrondiĝi kaj lerni simplan popoldancon — je iu momento kvindekda personoj tion faris. La vespero finiĝis per reciproka donacado, la kontribuo de ILEI estis disponigo de la ĵus aperinta numero de *Juna amiko* al ĉiu partoprenanto, kune kun aliaj materialoj.

La programo estis riĉa, kun ekskursoj al termalbanejo MiskolcTapolca, al la kastelo de Diósgyőr kaj al la ripozloko Lillafüred. Lunde la vizitantoj kontribuis al normalaj lecionoj en la lernejo.

Jen bona ekzemplo kiel eblas konstrui projekton, en kiu Esperanto ludas utilan rolon, kiu povas akiri subtenon de lernejaj direktoroj kaj gepatroj, kaj krome esti financata de eŭropaj instancoj.

Stefan MacGill

Salutu gimnazion Kalocsay

La 1an de septembro 2009 en la hungara vilaĝo Bercel, departemento Nógrád, ekfunkciis gimnazio Kálmán Kalocsay. Tie en du klasoj Esperanton instruas Ilona Sirkó, diplomito de d-ro István Szerdahelyi. Ĉi tie estas instruata ne nur la lingvo, sed okazas ankaŭ por-movada edukado.

La lernantoj deziras fari grandan ekspozicion de bildkartoj, kiuj poste estos konservataj en speciala albumo. Do, se vi ĝojas pro la iniciato kaj se vi volas subteni ilian pluan aktivadon, sendu saluton sur bildkarto al

✉ Gimnazio Kálmán Kalocsay, Esperanta Studenta Rondo, HU-2687 Bercel, Széchenyi út 3.

Imre Szabó

Impona kongreso en Nankino

Ĉirkaŭ tricent personoj, inkluzive de alilandaj gastoj kaj lokaj aŭtoritatoj, partoprenis la malfermon de la 8a Ĉina Esperanto-Kongreso, kiu okazis 3–5 dec 2009 en la Nankina Universitato.

La malferman ceremonion prezidis Yu Tao, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL). Chen Haosu, prezidanto de ĈEL kaj de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, en sia parolado diris, interalie:

“La 17a kongreso de la kompartio elmetis la strategion de granda prospero kaj granda disvolvo de la kulturo. Ni devas profunde esplori kaj pripensi, kiel Esperanto trovos sian pozicion en tiu ĉi grandioza afero, faros pli grandan kontribuon al konstruado de socialismo kun ĉinaj trajtoj, precipe ludos pozitivan rolon en interkomunikado de Ĉinio kaj la mondo, sub la premiso de reformado kaj pordomalfermo, kaj kiel realigi la supre menciitajn gravajn taskojn”.

Guo Xiaoyong, konstanta vicprezidanto de la Ĉina Fremdlingva Eldon-Distribua Administracio kaj vicprezidanto de ĈEL, notis la sukcesojn de la ĉina Esperanto-movado, kiu “plenplene montris la pozitivan rolon de Esperanto en kultura interŝanĝo kaj socia harmonio” kaj alvokis sekvi la kongresan temon: “Altigu nivelon de instruado kaj aplikado de Esperanto por servi al konstruado de harmonia mondo”.

Post la inaŭguro komenciĝis la laborprogramo. La partoprenantoj diskutis la raporton de ĈEL. Oni proponis intensigi la propagandon kaj instruadon de Esperanto. En la diskuto pri la instruado, oni decidis organizi komisionon por reguligi la instruadon de Esperanto, normaligi la lernolibrojn kaj konfirmi la kvalifikecon de la instruistoj por progresigi la Esperanto-instruadon en Ĉinio.

En apartaj kunsidoj siajn problemojn kaj taskojn diskutis la fakaj asocioj de fervojistoj, medicinistoj, instruistoj, komercistoj k.a. Okazis laborkunsidoj de prezidantoj kaj ĝeneralaj sekretarioj de lokaj Esperanto-asocioj, seminarioj pri azia kongreso kaj pri *Granda Vortaro Ĉina-Esperanta*. Estis elektita por la venontaj kvar jaroj nova estraro de ĈEL, kaj Chen Haosu restis kiel la prezidanto por la dua sinsekva periodo. La kongresanoj ĝuis plurajn artajn prezentojn.

La kongreso finiĝis per la himno *La Espero*. La 9a kongreso okazos post du jaroj.

(Laŭ materialo de ĈIIC)



Chen Haosu, kiu estas prezidanto ne nur de ĈEL, sed ankaŭ de la landa Amikeco-Asocio, starigis klarajn celojn al la esperantistoj de la plej multe loĝata lando en la mondo.

Nepalo kongresis

La Kongreso de la Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) okazis 5 dec 2009 en Padmakanya School, Dillibazar, Katmandu. Partoprenis 40 esperantistoj, pli ol duono de la tuta membraro.

Post la kantado de *La Espero*, Posh Raj Subedi enkondukis unuminutan silentperiodon memore al antaŭa prezidanto de la asocio, d-ro Keshav Ram Joshi, kiu forpasis antaŭ duona jaro.

Reprezentantoj el diversaj branĉoj de la asocio kaj aliaj gravaj esperantistoj — Himlal Parajuli, Shree Prasad Pokharel, Mukunda Chhatry, Mukunda Raj Pathik kaj Rajen Manandhar — parolis pri lastatempaj agadoj kaj novaj planoj kaj faris sugestojn ĉi-rilate. La jara kaj financa raportoj estis prezentitaj de respektive Bharat Ghimire kaj Shree Prasad Pokharel. Membroj komentis, faris demandojn kaj fine aprobis ambaŭ raportojn.

La kongreso finiĝis per parolado de la kunvenestro, Indu Devi Thapaliya, prezidantino de NEspA. Ŝi raportis pri la agado de la pasinta jaro, menciante inter aliaj aferoj la aperon de la *Nepala-Esperanto Vortaro*, la vojaĝon de tri membroj al la 94a UK en Pollando kaj la sukceson de la 8a Himalaja Renkontiĝo.

La asocia prezidantino rimarkigis, ke en la venonta jaro NEspA 20-jariĝos, kaj esprimis esperon ke ni celebros ĝin per intensigita movado. Poste ŝi kuraĝigis membrojn partopreni en la 6a Azia Kongreso en Ulan-Bator.

Fine ŝi diris, ke la tri jaroj de ŝia KAEM-membreco kiel la reprezentanto de Nepalo finiĝis, kaj ŝi petis ke la kongreso elektu novan KAEM-anon. Post duonhora diskutado, Mukunda Raj Pathik estis elektita por la venontaj tri jaroj.

Bharat Kumar Ghimire

Publike diskuti Esperanton

(ĈIIC). 22 nov en la Pekina Instruista Universitato okazis subforumo de PEA ĉe la Akademia front-forumo. En la subforumo ekde 2001 oni ĉiujare diskutas pri la Esperanto-movado, teorio kaj fruktoj en Esperantujo; ĝi ne nur altiras esperantistojn, sed ankaŭ interesas ne-esperantistojn.

Ĉi-jare temis pri “Esperanto en la 60 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio”. Profesoro Liu Haitao el la Ĉina Komunikativa Universitato prelegis pri “Kaŭzo kaj analizo pri relativa sukceso de Esperanto — komento kaj konigo pri la plej nova studo de d-ro Detlev Blanke”. Wang Shanshan, raportistino de la Esperanto-sekcio de la Ĉina Radio Internacia, faris prelegon pri la 45-jara vojo de la Esperanto-sekcio de ĈRI. Ŝia kolegino Yu Jianchao prelegis pri la historio de la Esperanto-instruado en la Ĉina Komunikativa Universitato. Xiao Huoli, eduka konsilisto de la Pekina Lernejo *Oazo*, prelegis pri la eduka valoro de Esperanto. Zheng Bocheng, esploristo de la Ĉina Centro de Sana Eduko, prezentis disertaĵon “Fremdlingva lernado helpe de Esperanta etimologio”.

Liu Zijia

Esperanto en Kamboĝo

(Landa Agado). Mi vizitis la lernejon de Chhim Sokha apud la Sendependa Monumento en la urbocentro de Phnom Penh. Tie mi renkontiĝis kun Esperantolernantoj de Chhim Sokha, kiu gvidas du kursojn por dudeko da lernantoj. Post dumonata lernado ili jam posedas sufiĉe la lingvon por interkompreniĝi kun mi.

Kvankam la kurso en la Kamboĝa ĉefurbo funkcias sufiĉe bone, al la lernantoj mankas okazo por uzi Esperanton. Sen utiligi tion, kion ili lernis, ili verŝajne forlasos Esperanton. Mi proponis al Chhim Sokha intensigi la interkomunikadon inter la Esperanto-kursoj de Kamboĝo kaj de Vjetnamio, precipe inter la kursoj de Phnom Penh kaj de Hochiminh-urbo pro la geografia proksimeco de ili. Ni organizos retan interkomunikadon inter esperantistoj de la du najbaraj landoj. Eble ni eĉ povos viziti nin reciproke. Nuntempe la veturado inter la du landoj estas tre facila (ses horoj per aŭtobuso), kaj vjetnamoj ne bezonas vizon por veturi al Kamboĝo, kaj kamboĝanoj ne bezonas vizon por viziti Vjetnamion.

Xin Zhu

Instruado progresas en Burundo

Burundo fariĝis unu el la landoj, kie Esperanto plej forte plivastiĝas, aŭ ĝi eĉ jam okupas la unuan lokon tiurilate. Asocio Nacia de Esperanto en Burundo (ANEB), akceptita kiel landa asocio de UEA en 2008, distingiĝas pro la sistema antaŭenigo de la instruado de Esperanto.

Unu el la fortoj de ANEB estas, ke ĝi disponas pri multaj entuziasmaj kaj sinklerigemaj aktivuloj, kio en la Afrika Agado de UEA estas konsiderata grava por certigi solidan progreson en unuopaj landoj. Ankaŭ tiusence ANEB fariĝis modelo, laŭ kiu oni povas lerni en aliaj landoj, ne nur en Afriko. Pri la sukcesoj en Burundo atestas freŝa raporto, laŭ kiu en la lernojaroj 2009/10 funkcias Esperanto-kursoj en 37 lernejoj tra la lando.

Laŭ Hasano Ntahonsigaye, sekretario de ANEB, la eduka sistemo de Burundo favoras al la fondo de Esperanto-kluboj en lernejoj. “El kvin tagoj de lernado, unu tago estas por kulturaj aktivecoj kaj en tiu tago funkcias ankaŭ kluboj. Estas kluboj de la angla, la svahila, la franca, matematiko kaj aliaj aferoj, — li aldonas. — Do, kiam oni volas fondi klubon de Esperanto en lernejo, la direktoro facile akceptas fari tion kaj multaj lernantoj eklernas la lingvon.” ANEB utiligas tiun ŝancon, ĉar, kiel la sekretario konfirmas, ĝia strategio ĝuste estas la fondo de lernejoj Esperanto-kluboj.

GK UEA

Sekvinda ekzemplo

(Ret-Info). Aplikado de Esperanto en ĉiutaga faka medio estas malnova deziro de esperantistoj. Bona kaj sekvinda ekzemplo estas la kafo-komercejo de Giacomo Lorenzelli, kiu en sia sep-lingva retpaĝo uzas ankaŭ Esperanton.

Se inter viaj konatoj estas gvidantoj aŭ komercistoj de la gasteja/kafeja industrio, eble indas turni ilin al la retpaĝo: <http://www.coffee.byethost12.com/>

Eble tiu retejo instigos aliajn Esperanton parolantajn entreprenistojn ekuzi publike en sia fako ankaŭ Esperanton apud la aliaj lingvoj...

Szilvási László



Barlastono instruas kaj amuzas

Ni estis en Course-You-Can, en Barlaston, la 23–25-an de oktobro: Richard, Lorna, Ann, Carolyn, Roger, Ron, Simon kaj mi mem; ni estis lernantoj. Nia instruisto estis Malcolm Jones, persono konata al multaj esperantistoj. Ni venis el multaj partoj de Britio. Ni volis plibonigi nian uzon de la Esperanta lingvo.

Ni provis paroli Esperanton ekde la komenco de la kurso. Kelkfoje ni estis mallaboremaj kaj uzis la anglan, sed kelkfoje ni vere bezonis diskuti malfacilan gramatikan demandon en la angla. Malcolm donis al ni diversajn ekzercojn, plejparte ili estis tre amuzaj. Ĉiuj lernantoj ĝuis la kurson.

Barlaston estas la loko, kie la Esperanto-Asocio de Britio loĝas. La librovendejo kaj la oficejo estas tie. Apud Esperanto-domo estas la Wedgwood Memorial College, kie ni ĉeestis la kurson, manĝis kaj, por la plimultaj lernantoj, ni dormis. La malnova domo estis bona kaj la arboj malantaŭ la domo estis tre belaj.

Brian Haddon

Postnoto de la instruisto: Course-You-Can, kiu okazas ĉiun oktobron, celas komencantojn/progresantojn — precipe anglalingvajn, sed estus interese estonte havi studentojn ne-angle-parolantajn. Du el la ĉi-jaraj studentoj revenis post la pasintjara sperto, la aliaj estis unufojaj vizitantoj al la kolegio, kiuj jam iomete lernis — ĉu per la korespondaj kursoj de EAB, ĉu per lernu.net. Avantaĝe estis, ke samtempe okazis *Drono* (LOE-182, p. 6): tiel la novbarkitoj povis renkonti iom malpli freŝajn bulkojn!

La sidejo de Esperanto-Asocio de Britio ĉe Wedgwood Memorial College en Barlaston invitas en 2010 al jenaj aranĝoj:

16 jan. **Ni teatrumu**. Staĝo pri Esperanta teatro.

15–17 jan. **Drono**. Semajnfina Esperant-lingva **Diskutrondo** (por progresintoj) pri diversaj temoj. Samtempe okazos **Dronido** (por progresantoj) — spertuloj kunvenigu nespertulojn!

9–13 aŭg. **50a Somera Festivalo Kunludu kaj kunstudu en Barlastono**. Du-nivela kursaro kun la eblo turismi aŭ private studi/esplori en la Biblioteko Butler. Pro la ĉi-jara jubileo okazos aparta festo meze de la semajno.

22–24 okt. **Course-You-Can**. Kurso ĉefe por anglalingvaj komencantoj/komencintoj.

22–24 okt. **Drono**. Semajnfina Esperant-lingva diskutrondo pri diversaj temoj (samtempe kun ‘Course-You-Can’).

✉ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston Staffordshire, DT12 9DE, Britio.

☎ +44-(0)1782-372141


✉ eab@esperanto-gb.org

Malcolm Jones

Pri tri ŝipoj en tri lingvoj

La verkistino Margrit Vollertsen-Diewerge el la germana urbo Erlangen verkis kaj eldonis kadre de la projekto *Lernejoj — Lingvoj — Ĝemelurboj* kelkajn trilingvajn fabellibrojn. Ĉiufoje apud la germana lingvo ili aperis ankaŭ en la lingvo de iu ĝemelurbo de Erlangen kaj en iu tria lingvo. La fabelojn tradukas kaj ilustras lernantoj el Erlangen kaj la respektiva ĝemelurbo.

22 nov 2009 oni prezentis en la junulara centro *Frankenhof* ŝian sesan volumon *Tri nigraj ŝipoj*, kiu aperis en la lingvoj germana, rusa kaj Esperanto. Ĝi estas dediĉita al la Ruslanda ĝemelurbo Vladimir.



Oni laŭtlegis partojn el la libro en la tri lingvoj. La Esperanto-parton transprenis profesoro Martin Haase el Bamberg. Infanoj el baletlernejo kaj junaj muzikistoj el muziklernejo ĉirkaŭkadrakis la aranĝon, en kiu la urba konsilistino Gerlinde Stowasser transdonis salutojn de la ĉefurbestro de Erlangen. Partoprenis ankaŭ la urba komisiito pri ĝemelurboj Peter Steger kaj la urba komisiito pri honoraj oficoj Renate Gregor.

Kiel speciala gasto partoprenis reprezentantino de la urba kulturoficejo en Vladimir. La prezidanto de la Bavara Esperanto-Ligo, Bernd Krause, informis pri Esperanto.

De ĉiu vendita libro la Ruslanda artlernejo ricevos po unu eŭron, la gimnazio en Erlangen ricevos malgrandan honoraroin pro la ilustraĵoj.

Bernhard Maurer



Disvastigi Esperanton en Rio

Kadre de la projekto *Esperanto por la publiko* grupo da volontuloj en Rio-de-Ĵanejro preskaŭ ĉiumonate informas pri Esperanto dum publikaj eventoj kaj en ofte vizitataj lokoj (*vidu supre*).

Ĉi tiuj inform-agoj okazis interalie ĉe la Statuo de Redemptora Kristo, sur la placo Mahatmo Ghandi, en la fama stadiono *Marakanao*, okaze de la kultur-eventoj dediĉitaj al la batalinta sklavo Zumbio, kantisto kaj komponisto Dorival Caymmi, verkisto kaj komponisto Drummond de Andrade k.a.

La plej aktivaj disvastigantoj de Esperanto estas: Evandro Caboclo, Marilza Silva, Ilza Boiko, Rinaldo Galindo, Raymundo Souza, Givanildo Ramos, Aristides, Nilson Bulhões, Walter Fontes, Lenice, Lucila do Vale, Diego Ribeiro, Jair Sales, Rosângela Oliveira, Maurina Ribeiro kaj multaj aliaj.

Evandro Caboclo

Dum dudek jaroj en amika etoso

La unuan decembran dimanĉon, okazis la 78a Renkonto de Esperantistoj en la Paraíba Valo, en la brazila urbo Porto Real, ĉe "Instituto Educacional" — komforta lernejo en la urbocentro.

Post la legado de la protokolo, Milton Serra memorigis al la ĉeestantoj, ke ĉi tiu monato markas dudek jarojn da tiaj sinsekvaj renkontoj en nia regiono. La partoprenantoj ĉeestis prelegojn de Alexandre Serafim (Ĉu vi estas bone informita Esperantisto?), Paulo S. Viana (Guto da gramatiko), Maurício Monken (Ago-Tago en Karagŭatutubo) kaj Luiz A. Coelho ("Teatro en Esperantokulturo"). La lasta programero estis amuza intervjuo kun la veterana samideano Alfredo Aragon. Libroservo funkciis.

Paulo S. Viana

Vegetaranoj, ĉu modelo por ni?

Meze de oktobro reprezentantoj de 12 landaj asocioj, kaj de la Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) kiel membro de la Eŭropa Vegetarana Unuiĝo, partoprenis en ties unua tritaga pintkunveno.

Ĝi estis organizita kiel strikta sinsekvo de labortagoj, dum kiuj ĉiuj povis prezenti siajn agadojn kaj diskuti pri eblaj komunaj kampanjoj. Oni konsideris plurajn aspektojn, de kiel aranĝi similan eventon en la sama dato en pluraj lokoj, por ke ĝi havu pli da efiko kaj reklam-potencialo por ĵurnaloj kaj televido, al kiel lobiumi je diversaj niveloj. Oni pritraktis EU-subsidenciojn kaj proponon pri reta deponejo por informiloj kaj materialoj de la landaj organizoj.

Vicprezidanto de TEVA Francesco Maurelli proponis al la estroj de eŭropaj vegetaranaj asocioj uzi Esperanton por demokrata kaj aktiva partopreno de ĉiuj vegetaranaj asocioj. Pro manko da tempo, ne eblis debati detale, tamen estis pluraj rimarkoj pri lingva problemo, ekzemple: "Se ni sendas retmesaĝon al ...lando en la angla, malverŝajnas ke ili ĝin komprenas", aŭ "Mi sugestas labori en subgrupoj, ĉar estas pli facile por la nedenskuloj [de la angla] aktive partopreni, dum en la plenaj kunsidoj estas pli malfacile", ktp. Intereso por Esperanto montriĝis klare, de pluraj partoprenantoj, kiuj promesis se ne lerni la lingvon, almenaŭ informiĝi pri ĝi.

La kunveno montris ankoraŭfoje, ke eblas prezenti Esperanton en faka medio, kaj ke tiu laboro estas fruktodona. Plie, ĉi tiu kunveno estu modelo ankaŭ por Esperantujo. Ni fakte debatis preskaŭ la samajn temojn kiuj estas ofte debatitaj dum UK, sed dum plenaj laboraj tagoj, kaj kun konkretaj celoj.

Francesco Maurelli

En la plej juna urbo de Litovio

La Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) okazas ekde 1959 (preskaŭ) ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

BET-46 okazos ekde la 26a de junio ĝis la 4a de julio 2010 en la orient-litovia urbo Visaginas, ĉ. 150 km de Vilno, proksime al la landlimo kun Belorusio. Visaginas, fondita en 1975, estas la plej juna urbo de Litovio. En ĝi estas 30 mil loĝantoj de pli ol 40 naciecoj. La urbo situas sur bordo de la lago Visaginas nur 6 km de la fama Ignalina nuklea elektrocentralo, kiu ĉesos funkcii fine de 2009. La urbon ĉirkaŭas belegaj naturparkoj. Ĉi tiu regiono pro arbaroj kaj montetoj estas nomata Litovia Svislando kaj pro abundaj lagoj Litovia Finnlando.

BET-46 funkcios en la moderne ekipita Profesia studcentro pri teknologioj kaj entreprenado, kie estas luksaj kondiĉoj por laboro. La urbo estas facile atingebla trajne, buse kaj aŭtomobile. BET-46, dediĉita al la 35-jariĝo de Visaginas, ĝuos ĉiuspecan helpon kaj kunlaboron de la urba gvidantaro.

Antaŭ kaj post BET-46 estas ebleco kontraŭ modera prezo ripozi en apud-urbaj altkvalitaj turismejoj kaj ripozejoj.

La programo estos tradicia: somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en Baltaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj k.a. La organiza komitato atendas proponojn por la programo.

Informojn pri la aliĝkotiĝo, loĝado, manĝado, vizoj serĉu en la retejo www.esperanto.lt, aŭ petu ĉe la organizantoj:

✉ p. k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio.

✉ litova.ea@mail.lt, pjedorovas@takas.lt, irenaa@takas.lt

Rumanio: Tutlanda Simpozio

4–6 sep okazis en Tăuții Măgherauș, en la distrikto Maramureș, tutlanda simpozio, kun ĉ. 30 partoprenantoj. Ĝin organizis Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR) kune kun la loka esperantisto Emil Crâncău.

Emil Crâncău estas grava personeco de la urbeto, en kiu li naskiĝis, lernis kaj kien li revenis kiel instruisto; dum dek jaroj li prizorgas la vilaĝan muzeon. La partoprenantoj estis oficiale akceptitaj en la urbodomo far la vicurbestro, kiu bone konas kaj apogas la lokan Esperanto-agadon.

La simpozio komenciĝis en la muzeo de Misztótfalusi Kis Miklós (1650–1702), humanisma presisto kaj eldonisto naskiĝinta en la urbeto. Interese kaj detale prelegis pri li Jozefo Nagy, poste la partoprenantoj vizitis la muzeon, kie ili povis vidi originalan ekzempleron de lia *Biblia Aureus* (Ora Biblio), eldonita en 1685, kaj multajn atestaĵojn de lia admirinda eldona agado.

La simpozio estis daŭrigita en la loka lernejo, per prelegoj prezentitaj de Mihai Trifoi, Iolanda Olah, Adriana Dolca, Mihaela Dolca, Petronela Ivaniuc kaj Aurora Bute. Mi ĝojas, ke mi sukcesis instigi miajn studentinojn preligi kaj prezenti interesajn prelegojn, eĉ se en ne ĉiam senerara lingvo.

Nia gastiganto invitis nin viziti la vilaĝan muzeon, gvidatan de li mem. La prezentado estis elokventa, interese kaj humura. Je la fino, li kaj lia edzino regalis nin per “palincă” (loka specialaĵo de prunbrando) kaj “sarmale” (speco de farĉita brasiko).

La duan tagon ni ekskursis en la distrikto Maramureș, kun haltoj en la monaĥinejo Bârsana, belega loko, kun tradiciaj lignaj konstruaĵoj, en la vilaĝa muzeo aranĝita apud la urbo Sighet, kie estis rekonstruitaj karakterizaj loĝejoj el ĉiuj apartaj zonoj de la distrikto, kaj en la Memoriga muzeo de la hororaĵoj de la komunismo en la sama urbo, kie la etoso eĉ sentigis al ni la teruran komunismon. La lasta ekskurscelo estis la fama Gaja Tombejo, kie sur la krucoj oni povas vidi bildojn kaj versojn, ofte humurajn, pri la vivo de la mortinto.

La tria tago de la simpozio estis rezervita al la vizito de la urbo Baia Mare, kie ni vizitis, interalie, interesan kaj raran muzeon pri mineraloj. La dum-simpozia etoso estis bela, esperantista, ni ĉiuj kontentis pri ĉio, kion ni vidis, aŭdis, gustumis kaj spertis.

Aurora Bute

GRUPE-13

Jam la dek-trian fojon renkontiĝis en la sudpollanda urbo Gliwice esperantistoj por partopreni 6–8 nov 2009 la tradicion Gliwice’an Rendevuon de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto — GRUPE-13. Venis ĉirkaŭ 40 esperantistoj, inkluzive de gastoj el la partnera urbo Dessau el Germanio. La gastoj transdonis salutleteron de la urbestro de Dessau al la urbestro de Gliwice.


En la malfermo partoprenis sekretario de la urba estraro Andrzej Karasiński kaj zorganto pri la Muzeo de la Gliwice’a Radiostacio Andrzej Jarczewski.

GRUPE-13 estis organizita ankaŭ por festi la centan datrevenon de la fondo de Esperanta grupo en nia urbo (tiam Gleiwitz). En porokaza ekspozicio oni montris materialon ligitan kun la Esperanta movado dum la pasintaj cent jaroj. La partoprenantoj aŭskultis interesan prelegon de Roman Dobrzyński pri la historio de la pollanda himno. En la sabata vespero oni spektis la monodramon *Ludoviko Lazaro* de Georgo Handzlik. Oni povis spekti ankaŭ du interesajn filmojn de Dobrzyński.

Dimanĉe ĉiuj, laŭ la invito de la zorganto pri la Muzeo de la Radiostacio en Gliwice, povis aŭskulti prelegon pri mitoj kaj faktoj ligitaj kun la mondfama hitlera provoko en 1939. Andrzej Jarczewski antaŭ nelonge eldonis pri tio la libron *Provokado*. La titolo estas intence en Esperanto, omaĝe al nia jubileo.

Multaj partoprenantoj promesis veni denove venontjare por festi kune la komencon de la nova jarcento de la Esperanta agado en Gliwice.

Stanisław Mandrak



Unufraze

★ 30 okt 2009 en la “Hejmo de Literaturo” en Triesto estis lanĉita *Via Zamenhof* la itala traduko (de Michela Lipari k Filippo Franceschi) de *La Zamenhof-Strato* de Roman Dobrzyński. (Edvige Ackermann)

★ En la Jagelona Universitato k en la Supera Lernejo de Direktado k Bankismo (WSZiB) en Krakovo ĉi-aŭtune komenciĝis E-kursoj gvidataj de Maria Majerczak. (M.M.)

★ Jam por la 11a sinsekva jaro prof. Hugo Mora Poltronieri instruos Eon en la Fako pri Filologio, Lingvistiko k Literaturo de la Universitato de Kostariko ekde 4 jan ĝis 26 feb 2010. (Universitato)

★ 3 dec en la seminario *La beletra tradukado* en la universitato de Kolkato (Barato) Probal Dasgupta prelegis pri la temo “Traduki la porinfanan fikcion: la pedagogio k la postnacia fantaziejo” surbaze de bengaligo per Eo de la itala infanlibro *La taglibro de Joĉjo Tempesto* de Vamba. (P.D)

★ A. Giridhar Rao prezentis la vidpunkton de UEA en scienca konferenco “Defioj de etneco: la loka kaj la tutmonda”, kiu okazis 25-27 nov 2009 en la universitato Osmania en Hajderabado, Barato. (*Libera Folio*)

★ 25 nov la amatora aktorino Helena Biskup prezentis la polan version de la monologo *Doktoro Esperanto* de Mario Migliucci por la studentoj de la universitato de la tria aĝo en la pollanda urbo Gdynia. (Urszula Wiczorek)

★ 48 komercistoj en la 3a jarkunveno de ĉinaj E-komercistoj (Xi’anm 2-4 okt 2009) interŝanĝis opiniojn pri uzado de Eo en komercado k aliaj temoj. (ĈIIC)

★ Okaze de granda spiritisma evento en Olinda (Brazilo) E-Asocio de Pernambuco starigis budon kun televidaparato, por montri librojn, filmojn k alian materialon pri Eo. (*BEL Informas*)

★ Pro konsidero de politika neŭtraleco la estraro de la Norvega E-Ligo decidis ĉesigi la membrecon de NEL en la Norvega Socia Forumo, en Forumt for Utvikling og Miljø k en Nordia Asocio. (*Norvega Esperantisto*)

★ En Montrésort (proksime de Tours, Francio) oni inaŭguris novan ZEOon konsistanta el granda verda stelo kun la skribaĵo *Esperanto Internacia Lingvo*; movate de akvo el batpumpilo, ĝi turnas 80-centimetran globuson. (*Heroldo de Esperanto*)



La sendanĝera bonhumora ĉefo de Eŭropo *Dafydd ab Iago el Bruselo*

Ekster Eŭropo oni surpriziĝis. Kiel oni povas elekti sen-vizaĝan nekonatan politikiston fronte al la monde konata kaj sperta Anthony Charles Lynton Blair, eksa ĉefministro de Britio? Usonaj, japanaj kaj aliaj diplomatoj en Bruselo havas multe da malfacilaĵoj por klarigi, kiel Eŭropo faras decidojn pri la postenoj. Post tiom da militoj kaj pro tiom da nacia fiero — certe de la grandaj Eŭropaj nacioj — ŝajne nepras elekti iun, kiu certe ne minacos, nek aŭdacos. Pli gravas, ke Eŭropaj ĉefoj plu venos al Bruselo kaj staros antaŭ la televidkameraoj.

Tia homo estas la nova prezidanto de la Eŭropa Konsilio Herman Van Rompuy, eks-ĉefministro de Belgio. Li venkis, kie la eks-ĉefministro de Britio Tony Blair fiaskis, kaj li fariĝis la ĉefo de la Eŭropa Konsilio, la kuniĝo de la Eŭrop-Uniaj ĉefoj. Sed la “elekto” (ne okazis publika voĉdonado) de Van Rompuy, kaj de lia nekonata subulo Catherine Ashton, montras kiom feroce la Eŭropaj ĉefoj gardas

Esperanto denove malakceptita

Ankoraŭ ekzistas kampoj, kie Esperanto estas malakceptata pro ĝia deveno, pro la simpla fakto, ke ĝi estas “artefarita lingvo”, kiel oni formulas. Tia kampo estas la germana lingvokonkurso “Bundeswettbewerb Fremdsprachen”, kiun partoprenas jare 15 mil lernantoj — ideala celgrupo por Esperanto, kiun lernas homoj kun intereso pri eksterlando kaj ofte ankaŭ pri fremdaj lingvoj ĝenerale.

La konkurso malakceptis Esperanton jam en 1981, kiam rajtis partopreni “ĉiuj vivantaj lingvoj” — la malakcepto do ne respektis la proprajn regulojn. En 1990 oni konfirmis la malakcepton de Esperanto. Ĉi-foje lernantoj rajtas partopreni, interalie, per eseo en lingvo “laŭ ilia elekto”, sed denove oni ne allasis Esperanton citante la malnovan decidon.

Verŝajne la malakcepto baziĝas interalie je la ĝenerala nescio pri la hodiaŭa Esperanto-kulturo. Eblis legi en la konkursa retforumo flanke de oficialulo, ke la konkursan postulon je “fremdlingva kulturo” Esperanto ne plenumas. Ni do lernu, ke ni zorge kaj daŭre informadu pri nia Esperanto-kulturo.

Raportis pri la malakcepto de Esperanto en la ĉefpaĝa artikolo de la semajnfina eldono la gazeto *Generalanzeiger* en Bonn, kie troviĝas la konkursa sidejo. La aŭtoro de la artikolo faras interesan rezonadon: “Pli da ŝancoj la Esperantanoj eble

ne nur sian povon sed ankaŭ la aliron al televidkameraoj. Ili ne volis fortan unuan prezidanton de la Eŭropa Unio.

“Nek sinjoro Van Rompuy nek baronino Ashton estas tiuj, kiujn oni nomas graveguloj. La elekto de ili indikas preferon por malpli ambicia komenco de ĉi tiuj postenoj”, — komentis Jonny Dymond, korespondanto por *BBC News* en Bruselo.

Van Rompuy akceptis la prezidantecon la 1an de decembro. Kiel la unua posedanto de la prezida posteno en la Eŭropa Konsilio, li havos gravan efikon al siaj posteuloj. La unuaj agadoj de Van Rompuy, kiu travojaĝis Eŭropon, jam montras ke li estos malambicia. Liaj alparoladoj dum la vizitoj de la Eŭropaj ĉefurboj ja indikas lian grandan zorgon ne ofendi aŭ tuŝi iun ŝtaton. En Slovenio li promesis “kontinuecon” kaj “koherecon”. En Milano Van Rompuy parolas pri “zorga aŭskultado” kaj konsiderado de la intereso kaj senseblecoj de ĉiuj. En Bruselo Van Rompuy konfesas al ĵurnalistoj, ke li ne faros iun ajn politikan deklaron dum la unua monato.

La prezidanto de la Eŭropa Konsilio estas “elektita” por la periodo de du jaroj kaj ses monatoj. Ekzistas ebleco renovigi la oficon nur unufoje. Kvankam la nova ofico estis elpensita por doni homan “vizaĝon” al la Eŭropa Konsilio, oni jam havas dubojn pri ĝia efikeco. La mallonga periodo de ofico nur donas la okazon al la postenenhavanto ekkoni la dosierojn kaj labormanierojn. Sed ĝuste tiam la ofichavanto devos forlasi la postenon.

Eŭropo, kuniĝo de 27 landoj kaj pli ol 500 milionoj da homoj, nun havas la “ĝustan” homon por ĝin gvidi. Ĝi “elektis” homon kiu ofendos neniun. Simile okazis la “elekto” de la alia pinto-posteno — Alta Reprezentanto de la Unio pri Eksterlandaj Aferoj kaj Sekureca Politiko de la Eŭropa Unio. Simile al Van Rompuy, oni ne komprenis ekster Eŭropo: kial oni elektis duarangan politikistinon Catherine Ashton fronte al aro da aliaj eblecoj. Dum certa tempo eĉ la nuna brita eksterlandministro estis menciata.

“Kiom respektinda kaj amika ŝi eble estas, ŝi ne ŝajnas taŭgi al la ideala profilo de Eŭropa ministro pri eksterlandaj aferoj”, — diris observanto.

havas, se ili farus el sia lingvo la ‘lingvon de unu lando’ — se ili do kunvenis en unu loko kaj deklarus tiun sendependa. Pli granda ol la Vatikano ĝi certe estus. Rimarkinde, ke oni ĉiam unue devas meti limon inter si kaj aliaj por esti serioze traktata”.

Eblas subteni la peton por la venontjara enmeto de Esperanto per reta peticio <http://apps.facebook.com/causes/397853> aŭ per retletero al la konkurso info@bundeswettbewerb-fremdsprachen.de.

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand

Welt-, aber keine Fremdsprache

Von Wolfgang Pichler

BONN. Internationalität kann ein Nachteil sein. „Die Kenntnis der Sprache eines anderen Landes ermöglicht echte Verständigung“, schreibt Bundespräsident Horst Köhler, Schirmherr des „Bundeswettbewerbs Fremdsprachen“. Schwierig wird das, wenn eine Sprache in 120 Ländern Sprecher hat, nicht aber die „Sprache eines anderen Landes“ ist. So ergeht es gerade der internationalen Welthilfssprache Esperanto. Für die Kurzgeschichtensparte des Wettbewerbs (morgen ist dort Bewerbungsschluss) dürfen die Teilnehmer „eine Fremdsprache eigener Wahl“ benutzen – nicht aber Esperanto, das den Organisatoren als zu „künstlich“ gilt.

Wie viele Esperantosprecher



Sprecher (nicht nur) in Europa und Asien: Esperanto. FOTO: DPA

sich darüber ärgern müssen, ist unklar; ein paar tausend sind es weltweit aber bestimmt. Eigentlich haben sie alles, was eine echte Sprachkultur ausmacht: Bibelübersetzung, Rockbands, Zeitungen, Internetseiten, Nationalhymne. An den Unis in Ungarn ist Esperanto inzwischen als Zweit-

sprache anerkannt; rund 5.000 Studenten pro Jahr legen dort Prüfungen in ihm ab. Von „künstlich, weil nicht lebendig“ kann also nicht die Rede sein – anders als beim Latein zum Beispiel, das beim Fremdsprachenwettbewerb erlaubt ist.

Dieser Widerspruch wird noch einige Zeit so bleiben: Was eine „richtige“ Fremdsprache ist, kann nur der Beirat des Wettbewerbs entscheiden, der erst wieder im Frühjahr tagt.

Mehr Chancen hätten die Esperantiker vielleicht, wenn sie ihre Sprache zur „Sprache eines Landes“ machten – wenn sie sich also an einem Ort versammelten und den für unabhängig erklärten. Großer als der Vatikan würde er allemal. Komisch, dass man sich immer erst abgrenzen muss, um ernstgenommen zu werden.

Lernolibro atentigas pri Esperanto

La prestiĝa eldonejo de lernejaĵ libroj *Teide* aperigis novan lernolibron por la lasta jaro de mezlernejo, en kiu Esperanto estas elstare reliefigita.

Laŭ la kataluna mezlerneja studplano la gejunuloj devas lerni pri sociaj aspektoj de lingvo: kontakto inter lingvoj, individua kaj socia dulingvismoj, diglosio, malapero de lingvoj, socia restarigo de lingvoj, lingvonormigado, lingvaj rajtoj k.a. Ĝuste la 22-paĝa kvina ĉapitro de la lernolibro, sub la titolo *Lingvoj kaj socioj* prezentas tiun vastan temon kaj tiucele dediĉas la kvar unuajn paĝojn al Esperanto.

Oni prezentas la internacian neŭtralan lingvon kiel parton de ampleksa movado por la atingo de egalaj rajtoj inter la civitanoj kaj entute por pli justa kaj paca mondo. La artikolo komparas la enkondukon de Esperanto kiel dua lingvo de la homaro al la celoj de aliaj movadoj, por montri, ke ĝi ne estas pli utopia ol la egaleco de viroj kaj virinoj aŭ la starigo de mondo sen militoj, malsato, kuraceblaj malsanoj kaj kun justa distribuo de la havaĵoj. Pro tio, same kiel indas batali por realigi ilin, ne indas flankenlasi la celon de neŭtrala lingvo.

La lernolibro, kaj eĉ pli la libro de la instruisto, proponas multajn laborojn pri la teksto kaj entute pri Esperanto: analizon de la artikolo kun listigo de ĝia argumentaro, redaktaĵon pri Esperanto, klasan debaton pri ĝi, legadon de la artikolo en la katalunlingva Vikipedio pri kin-arto kaj Esperanto k.a.

Unu el la aŭtoroj de la lernolibro estas la esperantistino Anna Maria Muñoz, mezlerneja instruistino de la kataluna lingvo.

Kataluna Esperanto-Asocio

Leterkesto

En la 8a paĝo de la decembra numero aperis artikolo *Balo "Unu revo plia"*, sed oni ne diras, kie tio okazis. Tutcerte estus bone doni tian informon.

Ramon Perera (Katalunio)

LODE: Ĝi okazis en Bento Riberio, en Rio-de-Ĵaneiro.

Mi ŝatis tiun preskaŭ centjaran "faskon da taskoj" publikigitan en via Ondo! Bonega propono!.. Ni ne tre ofte cerbumas pri tiuj "subtilaĵoj"!

Jackie Huberdeau (Francio)

14 nov 2009 en Hilversum (Nederlando) forpasis

Adriana J. Middelkoop (1913–2009)

Ŝi lernis Esperanton en la 1930-aj jaroj, verkis la vortaron *Nederlands-Esperanto-Nederlands* (1971) kaj kelkajn broŝurojn, estis estrarano (1967–1982) kaj ano de la ekzaminkomisiono de la Nederlanda Esperanto-Asocio (1965–1987), laboris kiel privat-docento pri Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo (1969–1978). Honora membro de UEA (1988) kaj de ILEI (2004).

27 nov 2009 en Creuë (Francio) pro kor-atako forpasis

Madeleine de Zilah (1937–2009)

diplomita inĝeniero kaj historiisto, ŝi estis instruisto licea kaj universitata dum 1960–1991. En 1960 ŝi edziniĝis kun Eugène de Zilah, kun kiu ŝi kunfondis la Metz-an Esperanto-klubon (1976), *La Gazeton* (1985) kaj la societon OSIEK (1988). Kiel kunredaktisto de *La Gazeto* ŝi verkis plurajn artikolojn, multe aktivis en OSIEK, kaj estis membro de la teamo de *La Esperantisto de la Jaro*.

Ni funebras kaj kondolencas.

Skribu ĉapelitajn literojn sentime


Antaŭnelonge aperis nova versio de Esperanto Klavaro (EK). EK estas programo, kiu kapabligas vin tajpi Esperanto-literojn kun ĉapeletoj je ĉiuj Vindozaj programoj kiuj subtenas Unikodon: dokumento-redaktilo, retumilo, retroŝtilo k.a. EK funkcias sub Vindozo 95/98/ME kaj Vindozo NT4/2000/XP/Vista. Sufiĉas do instali tiun ĉi programon en vian komputilon, kaj vi povas ĝui vian tajpadon, uzante la ĝustajn supersignojn.

EK permesas uzi prefiksajn kaj postfiksajn modifajn klavojn por enmeto de ĉapelitaj literoj, kaj ankaŭ atribui ĉapelitajn literojn rekte al certaj klavoj. Bildsimbolo de EK ĉiam rezidas en la sistema taskopleteto (angle: system tray), kaj vi povas aktivigi aŭ malaktivigi EK-on, klakinte sur ĝi per la maldekstra musbutono. Vi povas ankaŭ, klakinte per la dekstra musbutono, voki menuon, kiu ebligas voki la agordofenestron, voki helpon aŭ haltigi la programon.

La programo EK estas farita de Jurij Finkel (Ruslando). Detalajn priskribojn de la instalado kaj agordado vi trovos en la retejo de EK: www.esperanto.mv.ru/Ek/index.html

Agordo de EK

Defaŭlte, literoj "c", "g", "h", "j" kaj "s" sekvataj de "x" kaj de "h" estas aŭtomate anstataŭataj per ĉapelita versio. Vi do povas tajpi kiel ĝis nun, uzante x- aŭ h-sistemon, kaj la programo konvertas vian "sx" aŭ "sh" al "ŝ" kaj simile. Estas pluraj nomoj, kiuj komenciĝas per Ch (kiel Chantal); tial estas utile malaktivigi la h-anstataŭigon. Se vi volas aperigi x-on en teksto, sufiĉas tajpi ĝin dufoje. Vidu dekstre la agordo-ekranon.



Cimoj

Verkante tiun ĉi artikolon, ni konstatis problemeton uzante EK en Google Docs je Internet Explorer. Ne estis problemo pri retumilo Google Chrome aŭ pri Firefox — programo, kiu pro diversaj kialoj estas konsilinda.

Uzi EK en ret-mesaĝoj

Ofte esperantistoj plendas, ke ili ne povas uzi supersignojn en sia retroŝta komunikado. Efektive, eblas uzi ilin, sed necesas konscii, ĉu via retkesto (aŭ la agordoj de provizanto de via retkesto) subtenas Unikodon. Jam multaj subtenas ĝin, por ebligi al homoj senprobleman komunikadon. Ekzemple, uzante retkeston ĉe gmail de Google ni ne spertis ajnan problemon pri supersignoj.

Ŝajne la plej konata granda "malamiko de supersignoj" en tiu ĉi kampo estas la firmao *Yahoo* — iel ĝi konstante sukcesas ignori tion, ke la mondo ne estas uniforma, kaj ĝi ne volas helpi al siaj klientoj. Se do vi kapablas akcepti ĉapelitajn literojn, rekomendindas ankaŭ ilia verkado — en la 21a jarcento indas altigi nivelon de nia lingvo ne nur enhave, sed ankaŭ teknike.

Yves Nevelsteen kaj Peter Baláž

Herzberg: la Esperanto-urbo kaj la urbo de amikeco

Herzberg am Harz, urbo kun ĉirkaŭ 15 mil loĝantoj, situas meze de Germanio, ĉe la suda flanko de la Harz-montaro je la kruciĝo de la federaciaj vojoj 27 kaj 243. Apude troviĝas la arbaroj de la nacia parko Harz. Super la urbo videblas la 950-jara kastelo, kiu estas la plej granda faktrabkastelo en Malsupra Saksio.

Multajn pliajn historiajn informojn pri Herzberg oni povas trovi en la reto, en enciklopedioj, en gvidlibroj. Oni povas legi ankaŭ tion, ke ekde julio 2006 laŭ decido de la urba konsilantaro la urbo uzas la oficialan kromnomon “Esperanto-urbo”.

Tamen ekzistas travivaĵoj, kiujn vi povas sperti nur surloke en la Esperanto-urbo. Ĝi estas vizitinda ne nur pro la klerigaj aranĝoj de la Interkultura Centro Herzberg (ICH), la bela pejzaĝo kaj la interesa historio, la informtabuloj en Esperanto, sed ankaŭ pro la bonkoraj homoj (ĉu Esperantistoj aŭ ne), pro nekutimaj travivaĵoj kaj foje eĉ historiaj eventoj.

Kiam mi alvenis unuafoje al Herzberg pasint-aŭtune por ĉeesti TORPEDon 4 mi ne sciis, ke post unu jaro mi venos ĉi tien denove por pasigi 10 monatojn kiel volontulino en la Esperanto Centro. Kaj de tiu momento mi vivas tute alian vivon... Se mi skribus nur pri plusoj de mia restado ĉi tie neniu kredus je tio... Granda minuso por mi estas disiĝo kun miaj familianoj, ne sufiĉas ĉiutagaj skajpadoj, SMS-adoj... Pro manko de mono ni povas viziti nin tre malofte. Mia financa kontrakto sufiĉas nur por pagi mian loĝejon kaj manĝaĵon. Sed en nia vivo ni ne ĉion povas kalkuli per mono. Estas valoraĵoj, kiujn oni ne povas aĉeti per mono... Tiujn valoraĵojn mi spertas estante en Herzberg.

Ekzemple, hodiaŭ, je la tago de Sankta Nikolao mi kun la fama Heleno Fantom el Britio malgraŭ pluvo vizitis la urbon. Ni estis surprizitaj, vidante feston sur la Kristnaske ornamita ĉefplaco de la urbo. Imagu malgrandajn butikojn kun multaj sortimentoj, feliĉajn loĝantojn kiuj aĉetas memoraĵojn, babilas aŭ trinkas varman kafon. Vidu lokan blov-orkestron speciale

Heleno Fantom decembre en la Esperanto-urbo



vestitan, kaj aŭskultu Kristnaskan muzikon kaj bondeziron por la nova jaro, kaj kantu kun la lokuloj laŭ invito de la dirigento. Flaru multajn bonodorojn, kiujn oni povas renkonti nur dum tiu aranĝo, nekutimaj al mi. Eĉ unu minuton ni ne sentis nin fremdaj. Ni preskaŭ tuj fariĝis unuecaj kun la partoprenantoj de la hodiaŭa renkontiĝo.

Ĉi tiu urbo havas magian forton. Ĉi tie loĝas kelkaj etnaj grupoj, flegantaj siajn proprajn kulturon, religion, kutimojn kaj morojn. Ĉiuj vivas amike, estimante apartecon de la aliaj. Mi plibonigas mian konon de la germana lingvo en kurso por turkaj virinoj. Niaj renkontiĝoj estas specifa travivaĵo por mi. La virinoj estas vestitaj per longaj, nigraj manteloj, kaj sur la kapoj ili ĉiam havas kaptukojn. Ili estas surprizitaj, ke mi, havante mian propran familion, plenumas miajn revojn laborante en alia lando; kaj min surprizas, ke ili bezonas subskribon de nia instruistino post ĉiu leciono. Malgraŭ granda diferenco inter niaj kulturoj, mi konstatas, ke homoj ĉiam deziras amikecon, pacon kaj estimon, kaj ili scipovas ĝoji eĉ pro malgrandaj aferoj.

Dirante pri amikeco mi nepre devas mencii pri internacia geedza paro vivanta en Herzberg: Harald Schicke (germano) kaj Yeong Ok (koreino). Ili posedas ĉe la ĉefstrato ginsengo-butikon, kiun mi vizitas de tempo al tempo. Mi ege ŝatas interparoladi kun Yeong Ok, ĉar ŝi havas tute alian ol mi vivrigardon kaj sperton. En ilia butiko ĉiu trovos specifan, neforgeseblan kaj nekutiman etoson, kiu plibonigos ne nur sanstaton, sed ankaŭ animstaton. Mi ŝatas interparoli kun Yeong Ok pri nia vivo, pri ĉiutagaj problemoj, ĉar ŝi ĉiam trovas bonan solvon, ŝi scipovas mildigi nian eŭropan vivrigardon kaj certe mian tro energian/eksplozan karakteron.

Se vi estos en Herzberg pli longe aŭ vi alvenos marte vi povos ĉeesti renkontiĝon de la kanto-grupo *Buntaj birdoj*. La grupo konsistas el lokaj esperantistoj, amikoj kaj gastoj. Ĝia estro estas Otto Kern — konata persono ne nur en la Esperanto-movado, sed ankaŭ en la urbo. Li estas ege simpatia, ŝercema homo, kun kiu ĉiu ŝatas pasigi tempon. Otto kontribuas al la projekto Comenius per instruado de grupo de infanoj en loka bazlernejo. Antaŭ unu monato la grupo vizitis Hungarion por programo kun la partneraj lernejoj el Hungario kaj Britio. La nepino de Otto rekonis min kaj Helenon Fantom en la loka butiko kaj salutis nin Esperante.

Sabate okazos festa manĝo en la restoracio *Mamma Mia*, kie eblas mendi kvinpintan picon *Esperanto*. Partoprenos lokaj aŭtoritatoj kaj esperantistoj por komenci festi la Zamenhofan datrevenon. Tri tagojn poste mi partoprenos la inaŭguron de la Zamenhof-monumento fare de la urbestro Gerhard Walter. Ĝi estos historia momento, ĉar la unua en Germanio.

Venu al Herzberg — la Esperanto-urbo.

Małgosia Komarnicka

Interkultura Centro Herzberg / Germana Esperanto-Centro

✉ DE-37412 Herzberg/Harz Grubenhagenstr. 6.

☎ 0049/(0)5521-5983

📧 esperanto-zentrum@web.de

Akcento en kunmetitaj vortoj

Eseo de Ryszard Rokicki

1. Fono: profesoro Szerdahelyi kaj la “Tria Fundamento”

Dum la 72 UK en Varsovio estis planita prelego de prof István Szerdahelyi *Diakrona kaj sinkrona esperantologio*. Pro lia malsano ĝi ne okazis, sed la ĉefajn tezojn oni povis legi en la konferenca kajero de *Informilo por Interlingvistoj*. Tio estas siaspeca esperantologia testamento de la profesoro, ankoraŭ aktuala kaj atendanta sian plenumiĝon. En la konkludo Szerdahelyi dividis la evoluon de Esperanto en tri periodojn:

— La unuan periodon, ĝis la 1920aj jaroj, karakterizas ĉefe la konserva funkcio de la Zamenhofa *Fundamento* (FdE). La ribelemuloj aŭ forlasis la lingvan komunumon aŭ akceptis la Bulonjan Deklaracion. Lingva primitivismo, diletantismo kaj — sur certaj teritorioj — profetismo kaj sekteco karakterizas tiun periodon.

— Kvalita ŝanĝo okazis en la dua periodo pro la ekfunkciado de la Budapeŝta Skolo. Kreiĝas nova literatura lingvo markita per novstila uzado de la ĝis tiam ekzistantaj rimedoj. La unua *Fundamento* ne plu sufiĉas. Aperas la dua konsistanta el la signifaj verkoj: *Plena Vortaro*, *Plena Gramatiko*, *Parnasa Gvidlibro*, kaj la ligilo, mezurilo kaj informilo de la tiama Esperanto-kultura movado — *Literatura Mondo*.

— La tria periodo ligiĝas al formiĝo de aplika lingvistiko en la 1960aj jaroj, kio pozitive influis la formiĝon de la scienca esperantologio. La granda manko de tiu ĉi periodo estas, ke ne formiĝis la *Tria Fundamento*, kaj do la tasko de la esperantologoj estas ĝuste kreo de tiu tria *Fundamento*, kiu adekvatus al la hodiaŭa lingva kaj lingvouza statoj. La Esperantaj PIV kaj PAG estas nur daŭrigo de la antaŭaj verkoj, kaj ili retrogarde reprezentas la pasintan staton.

Bedaŭrinde la prijuĝo de Szerdahelyi ankoraŭ restas prava, eĉ pli: en kelkaj kazoj, ekzemple, la akcento de la kunmetitaj vortoj, la esperantologio ne nur ne evoluis, sed faris paŝon malantaŭen. Tiun temon mi volas prezenti kaj diskutigi.

2. Motivoj

Oni povas sin demandi, kial okupiĝi pri tia tre marĝena temo, kia la akcento en la kunmetitaj vortoj. La senpera kialo de mia ekokupiĝo pri la problemoj estis mia amiko, kiu pretigis novan lernolibron de Esperanto kaj deziras provizi ĝin per disko kun tekstoj por aŭskultado. Li liveris la tekstaron al profesiaj legistoj, turnante ilian atenton al prononco de certaj konsonantoj, vokaloj kaj akcento en kunmetitaj vortoj. Unu el la legistoj, juna movada aktivulo, instruisto de Esperanto, sugestis al la lernolibra aŭtoro ne insisti pri la kromakcento en kunmetitaj vortoj ĉar laŭ PMEG de Bertilo Wennergren “ekzistas neniuj reguloj, sur kiu silabo aperu la kromakcento”.

3. La fenomeno akcento (ĝenerale)

Por fronti la problemon, oni devas almenaŭ skize orientiĝi pri la akcento. Ĝi estas prononcfenomeno, kiu povas, sed ne devas aperi en la parolo. Por nia diskuto sufiĉas konscii, ke en la akcentohavaj lingvoj, la rolo de la akcento estas informi pri



Ryszard Rokicki prelegas pri la akcentado en Arkones-25, Poznań (Fotis Andrzej Sochacki)

gravaj (el la komunika vidpunkto) vortoj — **nocisignoj**, al kiuj la parolanto laŭdeziro turnas la atenton de la aŭskultanto.

Akcentohavaj silaboj povas esti lokitaj diversmaniere.

En **lingvoj kun konstanta akcento-loko** la situo de la akcenta silabo dependas nur de la loko, kiun ĝi okupas en la prononcata vorto, ekzemple, la antaŭlasta, kiel en la pola aŭ Esperanto;

En **lingvoj kun loza akcento-loko** la situo de la akcenta silabo dependas ne de la fonetika aspekto de la vorto, sed de ĝia morfologia strukturo. Tipan ekzemplon prezentas la rusa: “rUki” (manoj) kaj “rukI” (de [la] mano) aŭ la angla “Import” (importi) kaj “impOrt” (importo);

En **lingvoj kun libera akcento-loko** la situo de la akcenta silabo estas ajna enkadre de la prononcata vorto, pri tio decidas nur la parolanto. Ĝin oni trovas i.a. en la lingvo zirana, (зырянский) parolata en la nordo de la Eŭropa Ruslando.

Kiajn praktikajn profitojn de la akcenta fenomeno povas havi la lingvouzantoj? Jen ili:

Aperloko de la akcento en la vorto	Profitoj de la lingvouzantoj	
	Informiĝas pri la minimuma nombro de akcentaj vortoj en la frazo	Informiĝas, kie komenciĝas aŭ finiĝas akcentaj vortoj en la frazo
Loza aper-loko	jes	ne
Libera aper-loko	jes	ne
Konstanta aper-loko	jes	jes

Depende de la maniero kiel lokiĝas la akcentoporta silabo en la strukturo de la vorto, la aŭskultanto estas atentigata pri la minimuma nombro de akcentaj (nocisignaj) vortoj en la frazo. Kaze de la konstanta aper-loko, la parolanto ricevas aldone informon, kie komenciĝas aŭ finiĝas tiuj vortoj.

4. Akcento en la kunmetitaj vortoj

Jen pure praktika demando, kiu aperas ne nur antaŭ la lernolibraj aŭtoroj, sed ankaŭ antaŭ ni, simplaj instruistoj. Nome, kiun respondon doni al inteligenta, scivolema lernanto-pensuĉjo, se li demandos aŭ objektos pri la ĝusteco de nia prononcmankado rilate la vortojn kunmetitajn sintakse kaj morfologie. Kiel do prononci tiu-tipajn silabosinsekvojn?

[di plo ma la bo ra ŝo] — [di plo mo la bo ra ŝo] — [di plom la bo ra ŝo]

[ko mi ta ta kun si do] — [ko mi ta to kun si do] — [ko mi tat kun si do]

[o ra ĉe no] — [o ro ĉe no] — [or ĉe no]

FdE, PAG kaj PMEG komentarias la prononcmankon diversmaniere.

4.1. Akcento laŭ la *Fundamento de Esperanto*

Laŭ Zamenhof, la akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo (t.e. la lasta silabo de la radikalo aŭ la radiko). Danke al tiu regulo la uzantoj tuj rekonas:

— kiom da vortoj (nocisignoj) troviĝas en la parola teksto;

— kie finiĝas unu vorto kaj komenciĝas la sekva; tio estas tre helpa por lingve nespertaj esperantistoj. Zamenhof ne reguligis aparte la akcentadon en kunmetitaj vortoj — evidente li opiniis la 10an regulon sufiĉa.

4.2. Akcento laŭ la *Plena Analiza Gramatiko*

La aŭtoroj de PAG, pli-malpli, jene difinas la regulojn akcenti la Esperantajn kunmetitajn vortojn:

1. Du akcentoj ne povas sekvi senpere unu la alian.

2. En kunmetitaj vortoj la akcento de flankelemento malaperas kaj transdoniĝas al la antaŭa silabo, se tia ekzistas. Ĝia loko ofte estas markita:

— per pli longa prononco de la vokalo (se la vortkunmeto ne estas sufiĉe ofta — por faciligi la komprenon),

aŭ

— per mallonga, se la vortkunmeto estas relative ofta.

3. Ekzistas variantoj, kie la akcento havas la formon de pilonga vokalprononco.

4.3. Akcento laŭ la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*

La aŭtoro de PMEG jene difinas la akcentoregulojn en kunmetitaj vortoj:

1. Kromakcentoj povas aperi en longaj vortoj, precipe en kunmetitaj vortoj.

2. Kromakcentoj estas ĉiam libervolaj. Oni povas prononci akcentante ajnan silabon de la difinanta vortelemento (aŭ entute ĝin ne akcenti): *matenmAnĝo*, *matEnmAnĝo* aŭ *mAtenmAnĝo*.

3. Se oni sentas la vorton kiel unu tuton, oni elparolas ĝin sen kroma akcento aŭ transŝovas la akcentolokon unu silabon antaŭen, ekzemple: *matenmAnĝo* aŭ *mAtenmAnĝo*,

4. Se oni volas distingi la partojn de la kunmetaĵo, oni tiam kvazaŭ elparolas la vorton *matEno*, kiu havas akcenton sur E: *matEnmAnĝo*.

5. Alia rimedo por distingi la partojn de kunmetita vorto estas enmeti mallongegajn paŭzetojn inter la partojn, ekzemple: *konk|ludo* (kunmetita) kontrastas al *konk|Udo* (nekunmetita).

5. La solvo: klareco + simpleco = facileco

Ĉu tiu ekvacio respegulas la intencojn de Zamenhof kaj la ideon de la helpa lingvo internacia kia Esperanto. Klareco kaj simpleco de la supre prezentitaj tri sistemoj estas diversaj. Ĉe unu ekstremo estas FdE, kiu havas neniun regulon; ĉe la alia

Zamenhof-bibliografio

Reinhard Haupenthal komencis la kompilon de kompleta bibliografio de monografioj de Zamenhof (originaloj kaj tradukoj). Li volonte ricevos indikojn pri iom raraj aŭ malfacile atingeblaj titoloj, precipe se temas pri tradukoj en naciajn lingvojn — se eble kun indiko de biblioteka trov-loko. Skribu al Reinhard Haupenthal:

✉ La Saousse, F-84340 Malaucène, Francio

✉ RIHaupenthal@aol.de

la multnombra kaj ambigua regularo de PAG, kiun foje spitas la reguloj de PMEG. Ĝenerale, la reguloj de PAG kaj PMEG ne ĉiam kongruas inter si. Ekzemple, la kategorio de longeco de vokaloj ne aperas en PMEG, sed nur en PAG; dum en PAG mankas la kategorio de paŭzeto, kiu estas en PMEG. Zamenhof evidente trovis superflua difini apartan regulon pri la akcento en kunmetitaj vortoj.

La 10a regulo (“la akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo”) plene sufiĉas por priskribi la akcenton ne nur sur la sintaksa nivelo (en la vortoj aperantaj en la frazoj) kaj la morfologia nivelo (en vortoj elradikaj aŭ derivitaj), sed ankaŭ la akcentadon sur la transira nivelo, kia estas la morfologia vortkunmeto. Strange, ke la aŭtoroj de PAG kaj PMEG decidis plibonigi la Zamenhofan sistemon aldonante siajn dubindajn regulojn. Retorika demando: Kial oni daŭre deziras ŝanĝi la Zamenhofan gramatikon anstataŭ lerni kaj apliki ĝin?

Ioma, eĉ amatora scio pri la esenco de la akcenta fenomeno ĝenerale kaj la t.n. sobra rezonado sufiĉas por solvi la problemon (eĉ ne starigante ĝin). Se iu tamen nepre volas plibonigi la Zamenhofan lingvo-priskribon, mi sugestas ŝanĝi nur la vortumon de la 10a regulo, sed nepre konservi ties spiriton, ekzemple: “la akcento aperas sur la lasta silabo de la radikalo (respektive: radikalo)”. Jen, kiel simple kaj adekvate:

Tavoloj de la eldiro	Formoj depende de la eldirtavoloj		
Enfrazo apero	laborAĵo por diplOmo	komitAto kunsIdas	ĉEno estas el Oro
Sintaksa kunmeto	diplOma laborAĵo	komitAta kunsIdo	Ora ĉEno
Vortkunmetaĵo	diplOmo-laborAĵo	komitAto-kunsIdo	Oro-ĉEno
Morfologia kunmeto	diplOmlaboraAĵo	komitAtkunsIdo	OrĉEno

Estas la parolanto, kiu decidas, ĉu akcenti la silabon aŭ ne, sed tiu ne decidas, kiun silabon akcenti — li/ŝi simple obeas la 10an regulon, krom se nepre deziras enkonduki la sian (kaj havas por tio nerefuteblan motivon). Tion oni tamen ne faru en gramatikaj manlibroj.

6. Konklude

La instruista fakularo, des pli la aŭtoroj de gramatikaj manlibroj rolas duoble:

— kiel lingvistoj, oni devas priskribi kaj instrui la lingvon tia, kia ĝi estas, eĉ se la lingvaĵo enhavas formojn dubajn.

— kiel heredintoj de la Bulonja Deklaracio, oni devas rekomendi la ĝustan Fundamentan lingvouzon.

Roli kiel lingvisto — des pli, se oni ne estas tia — ne estas facile. Supozeble la aŭtoroj de la priakcentaj artikoloj en PAG kaj PMEG trovis la demandon pri la akcento en kunmetitaj vortoj nesolvebla per la *Plena gramatiko de Esperanto* en la Zamenhofa *Fundamento*, kaj, serĉante respondon, ili eble apogis sin sur siaj propraj lingvosento kaj komunikaj spertoj. Tioj tamen nek kovras, nek reprezentas la tutan lingvokomunumon, sekve donas al ili neniun rajton deklari la aliajn regulojn ol tiujn de Zamenhof.

Roli kiel heredinto de la Bulonja Deklaracio — des pli, se oni ne sentas sin tia — ankaŭ ne estas facile. Oni devas “deĉifri” el la *Fundamento* ankaŭ tion, kio en ĝi estas prezentita latente. Ĝuste tio estas tre malfacila tasko, ĉar oni devas havi lingvan senton analogan al tiu de Zamenhof. Tio okazis al Grabowski kaj Kabe, por nomi liatempajn samlandanojn. Sed, ĉu same al la aŭtoroj de PAG kaj PMEG?

Plan-lingva praulo kaj lia programo

La elpaŝo de August Theodor von Grimm (1804–1878)



Ideoj kaj rezonoj pri la plej taŭga plan-lingvo antaŭiris la enmondiĝon kaj ekfunkcion de la unuaj projektoj kun praktika signifo: Volapük (1879/80) kaj Esperanto (1887). Pioniro ĉi-kampa estis la nun forgesita August Theodor von Grimm, edukisto de la caridoj en Peterburgo. Ankaŭ liaj verkoj (vojaĝ-priskriboj, romanoj kaj biografio pri Aleksandra Feodorovna, imperiestrino de Ruslando) falis en forgeson. Konservigis lia tombo en la rus-ortodoksa tombejo de Wiesbaden.

Sub la dato de 1860-01-10 li verkis *Programo por la formado de komuna lingvo* kaj publikigis ĝin sur la kovriloj de la *Vortaro de la germana lingvo* (1860–1865) de Daniel Sanders (1819–1897). Ĉi programo antaŭvidis:

1. revuon kiel diskut-forumon;
2. mon-rimedojn por financi la projekton;
3. fondon de societo por akceli la projekton.

La enkonduko entenas ideojn poste disvolvigitajn de Zamenhof en ties eseo *Esenco kaj estonteco...* Ŝajnas, ke Grimm en sia kriteria katalogo anticipis aspektojn de Esperanto: 1. logikeco; 2. riĉeco; 3. eŭfonio; 4. facila lernebleco. Jam Grimm pledis por la principo de la plan-lingva naturalismo.

La finiĝanta 19a jar-cento efektive spertis tri diskut-forumojn por interlingvistoj: *Interpretor* (1889-1890), *Le Kosmopolit* (1892/93) kaj *Linguist* (1896-1897), kies enhava kaj laŭaŭtora analizo restas postulato. En ili ni renkontas nomojn poste famiĝintajn, i. a. Julius Lott, Antoni Grabowski, Wolde- mar Rosenberger kaj Edgar von Wahl.

Realigis ankaŭ la fondo de societoj: jam antaŭ Grimm la pariza *Société Internationale de Linguistique* (1858–1859), la madrida *Sociedad de Lengua Universal* (fondita en januaro 1860) kiu favoris la projekton de la hispana pastro kaj principo- edukisto Bonifacio Sotos Ochando (1785–1869), krome *American Philosophical Society* malaprobis la projekton de Schleyer donante preferon al Esperanto.

Kvankam la teksto de Grimm lasis spurojn en la plan-lingva faka literaturo, ĝi rekonatiĝis nur 130 jarojn post sia apero en mia broŝuro pri Grimm*.

Grimm ne plu spertis la aperon de Volapük, des malpli tiun de Esperanto. Pro tio restas spekulativa la demando ĉu li aliĝus al la movadoj kreitaj de la du projektoj. Ĉar la ideo ne fremdis al li, oni ne povas ekskludi tion.

Referenco

* Hauptenthal, Reinhard. *August Theodor von Grimm, forgesita prapatro de la interlingvistiko*. Saarbrücken, 1990.

Hauptenthal, Reinhard. *August Theodor von Grimm. Ein vergessener Ahnherr der Interlinguistik*. Saarbrücken 2007. (Vastigita, germana eldono)

Reinhard Hauptenthal

Trovi la solvon signifas trovi la ĝustan ekvilibron inter ambaŭ: tio estas unu el defioj antaŭ kiuj staras la instruistoj de Esperanto. Helpe povas servi la fakto, ke en Esperanto funkcias ne nur la kutimaj lingvaj dikotomioj kiel:

lingvaĵo **ĉiutaga** / lingvaĵo **formala**;

lingvaĵo **literatura** / lingvaĵo **ordinara**;

sed ankaŭ eble la plej grava dikotomio:

lingvaĵo de **spertaj uzantoj** / lingvaĵo de **komencintoj**.

En nia lingva komunumo estas pli multaj progresantoj (lingve nespertaj parolantoj) ol spertuloj, uzantaj la lingvon same ofte, kiel en etnolingvaj komunumoj. Tiu fakto havas ankaŭ gravan metodologian pezon, se ni volos lingvistike fronti Esperanton kaj priskribi ĝin. Fuĝi de la problemo kaj priskribi nur sian propran lingvaĵon laŭ sia propra lingvosento estas ia solvo (aplikata foje eĉ fare de profesiaj lingvistoj), sed solvo truka kaj riska, se temas pri lingvo planita, kia Esperanto.

Rimarkinde estas, ke lingve spertaj esperantistoj perceptas multajn kunmetitajn vortojn kiel **unu nocisignon** nekunmetitan kaj prononcas la vorton sen kroma akcento, ekzemple: matenmanĝo. La kroma akcento aperas nur, kiam oni havas utilon de ĝi. Ekzemple, en interparolo kun komencantaj esperantistoj. Du-akcenta prononco de la vortoj “matenmanĝo” aŭ “vespermanĝo” faciligas komprenon al la komencantoj, ĉar tio informas ilin, ke la formoj konsistas el po du radikoj kaj sekve reprezentas nocion perceptatan de la parolanto duelementa. Apliki la du-akcentan prononcon inter spertaj parolantoj, ne plu bezonantaj redundajn informojn, povas sentiĝi balasta.

En ĵargonaj, etnolingvecaj aŭ simple neglektaj aŭ eraraj prononcoj oni supozeble povas renkontiĝi kun transŝovo de la akcento aŭ plilongigo de la prononcaŭro (kiel priskribite en PAG) aŭ eble eĉ kun ŝanĝo de la kutima akcento-formo al paŭzeto (kiel tion notis PMEG) k.s. Tioj tamen estas prononcoj karakterizaj por difinitaj parolantaroj kaj uzataj ene de la koncerna prononcgrupo. Ekster tiuj ili ne estas rekomendindaj. Tiuj prononcmankoj ne faciligas la komprenon al mal-spertaj lingvouzantoj kaj en ekstremaj kazoj povas kaŭzi eĉ mis- aŭ malkomprenon. Sekve, mi proponas trakti plurajn, foje nebulajn ĉi-koncernajn regulojn en PAG kaj PMEG nur kiel penon priskribi (nian/sian) propran eraremon, neglektemon, aŭ teniĝon al la gepatrolingvaj kutimoj karakterizajn por difinitaj grupoj da lingvo(mis)uzantoj.

La 10a Zamenhofa regulo estas nur unu — klara, simpla kaj tuteca. Kial ne sekvi ĝin? Kiucele pli malfaciligis la jam malfacilan lingvon Esperanto?

Sugestoj al la PAG/PMEG-posteulo(j):

Por ke gramatika manlibro funkcii kiel fidinda konsultlibro por progresantoj, ĝi devas enhavi:

— plenan priskribon de la **fundamenta Esperanto** (la norma Esperanto);

— plenan priskribon de la **uzado en plej diversaj komuniktavoloj** (la vivanta Esperanto)

— komentariojn pri la **duboj aŭ diferencoj** inter la “vivanta” kaj “norma” Esperanto (se tiaj ekzistas) kaj **objektivajn klarigojn kaj pritaksojn** el la vidpunkto de ilia kongruo kun la *Fundamento* kaj ilia komunika valoro, tiel ke la komencintoj mem povu konscie decidi, kiun formon elekti por sia progresanteco. Nepre oni evitu formuli en dubaj kazoj deklarojn kaj regulojn elkatedre, ĉar ankaŭ gramatikisto rajtas ne scii precizan respondon, tamen lia tasko estas almenaŭ serĉi kaj esplori, se ne trovi ĝin.

Poemoj de Jorge Camacho

Foto de Cristóbal Manuel



Jorge Camacho [Ĥorĥe Kamaĉo], madridano, naskiĝis en 1966 en Zafra, en la hispana regiono Ekstremaduro. Eklerninte Esperanton en 1980, li baldaŭ kunlaboris ĉe vasta gamo da Esperanto-revuoj kaj ofte premiigis en Belartaj Konkursoj (Nova Talento en 1989). Post laboroj kiel i.a. instruisto de la hispana kaj ĉiĉerono, de 1995 ĝis 2009 li interpretistis ĉe la Eŭropa Unio. Nun li universitate docentas pri interpretado kaj ĉeflaboras en la hispana nacia biblioteko. Ano de la “ibera grupo”; akademiano (1992–2001); de 2007 ĉefredaktas la periodaĵon *Beletra Almanako*.

El lia verkaro elstaras la rakontaro *Sur la linio* (1991), liaj kontribuoj al la poemaro *Ibere libere* (1993) kaj novelaro *Ekstretoj* (1997); la primovada satiro *La Majstro kaj Martinelli* (1993); la sinsekvaj poemaroj *Celakantoj* (2004), *Saturno* (2004), *Eklipsas* (2007), *Koploj kaj filandroj* (2009).

Ĉe Camacho mejloŝtonan pinton “de nia realisma tradicio” vidas Mauro Nervi; Ragnarsson metas emfazon al lia “politike humanisma konscio” kaj “indigna soci-kritikado”; Miguel Fernández trovas ĉe Camacho “sisteman ellaboritan arton surbaze de simboloj, konceptismaj formuladoj... kaj ekzistadismaj anim-skurĝoj”.

La nun premiere aperantaj tri poemoj ilustras kelkajn tem-preferojn de Camacho, volonte ekvidanta l’ on eterne homan en praa silika hakilo — kaj elpinglanta por publika kritiko eterne homajn mis-ecojn.

István Ertl

la silika hakilo

malgraŭ tiom da instruoj
 la historio ne komenciĝis ĉe la oldaj
 sumeraj kojnosignoj aŭ praĉinaj hancioj*
 antaŭ sesdek, tridek jarcentoj, sed dekmilojn
 da generacioj pli frue kaj profunde en la tempo.
 ni prenū, ekzemple, silikan ŝtonhakilon aŭ bifaĉon
 de ia kuzo de la rekta homo, la hom’ metia, laborista,
 kaj legu ĝin. ni tenas en la nuna mano formon perfektan,
 tajlitan malkrude el la kruda ŝtono, el la ŝton’ unike taŭga
 inter kelkaj dekoj da similaj. niaj fingroj tenu, prenū firme
 ĉi fragmenton el silika roko, per preciza frapserio perkutitan
 al pura migdal’, al tranĉa diamanto. ni palpu la duran frukton
 de lerta manlabor’ kaj de teĥniko plej maturaj, lernitaj zorge,
 parkere hereditaj, pludonitaj. ni legu ĉi solidan dokumenton
 estiĉel protokolon pri l’ kapablo projekti fajnajn ilojn, trafajn
 ĉasilojn kaj armilojn viv-esencajn; pri la kreo celkonscia
 de funkcioj kaj formoj; pri ĉi ties diligenta konservado
 en angul’ trezoreja de la cerbo; pri la komunika art’:
 ĉu ne mirinda teksto? ĉi ŝtonan hakilon ni legu
 kiel bravan epopeon pri sennomaj herooj,
 sage pioniraj je la mondo sanga, ŝtala;
 aŭ kiel spegulbildon de l’ venusoj
 pufe vilendorfaj, lertamane
 faritan, forĝitan, finitan
 por batui, embuski
 kaj klingi
 bestojn
 ope

17.12.2008

hancioj. Skribsignoj de la ĉina lingvo, ekivalentaj je la japanaj kanĝioj

Vidu pli pri Jorge Camacho ankaŭ en la reto:

<http://jorgecice.blogspot.com/>

<http://esperantarespubliko.blogspot.com/>

en la ŝedo

sekrete,
 en ŝedo de la cerbo,
 trezor’ da klingoj
 — hakiloj, lancoj, sagoj

 en ŝedo de l’ animo,
 prete,
 la venen’
 de latentaj vortoj, agoj

12.2.2009

al geĵofobiuloj

vi, kiu mokas,
 mordas, atakas,
 kritikis, skoldas,
 predikas, sakras,
 damnas, kondamnas
 — kion vi timas?
 kion vi maskas?

kio vin tentas?
 en la silento
 de via ĉambro,
 per viaj fingroj,
 per viaj manoj,
 kion vi faras?


kion vi sentas,
 songas, deziras?
 kion vi diras?
 kion vi kaŝas?

23.6.2009

El Mia Jarcento

de Günter Grass

En 1999 aperis *Mia jarcento* de Günter Grass — cent mallongaj rakontoj, mozaikeroj de la dudeka jarcento. El malsamaj perspektivoj aperas malsamaj personoj: simpatiaj kaj malsimpatiaj, krimuloj kaj viktimoj, viroj kaj virinoj. Tiuj rakontetoj ligiĝas intime kun la germana historio, kaj finfine el la bunta ĥaoso aperas plena bildo de nia dudeka jarcento. Jam ok ĉapitroj el *Mia jarcento* aperis en *La Ondo de Esperanto*, elektite kaj tradukite de Wolfgang Kirschstein. Nun ni proponas la naŭan, en kiu temas pri la vivo antaŭ cent jaroj.



1910

Do nun mi rakontu, kial la buboj ĉi tie alkroĉis al mi tiun karesnomon, nur pro tio, ke mia nomo estas Berta¹ kaj mi havas abundan korpon. Tiam ni estis loĝantaj en la fabrika urbeto. Ĝi estis de la laborejo kaj tre proksime al la fabriko. Pro tio ni havas la tutan fumon. Sed kiam mi estas plendanta, ĉar la tolaĵo denove fariĝis griza dum sekigado kaj kiam la infanoj daŭre estis tusantaj, tiam diris la patro: “Lasu Berta, kiu ricevas salajron de Krupp, tiu devas rapide esti ĉe la laborejo”.

Tie ni loĝis dum ĉiuj jaroj ĝis antaŭ nelonge, kvankam ĝi estis mallarĝa, ĉar ni pluluis la ĉambreton malantaŭe, tiun kontraŭ la kunikla stalo, al du personoj, tiujn ni nomas manĝantaj luantoj, kaj mi ne trovis lokon por la trikmaŝino, kiun mi aĉetis de mia propra ŝparmono. Sed mia ulo ĉiam diris al mi: Lasu Berta, la ĉefa afero estas, ke ne pluvas enen.

Li laboris en la fandejo. Tie ili estis fandantaj kanontubojojn. Tio ja estis nur kelke da jaroj antaŭ la milito. Tiam estis laboro. Kaj tiam ili fandis iun umon, pri kiu ili fieris, ĉiuj, ĉar tia umego antaŭe ne estis en la tuta mondo. Kaj de nia urbeto multaj laboris en la fandejo, eĉ niaj du luantoj, ili ĉiam estis parolantaj pri tiu umo, spite al tio, ke ĝi estis treege sekreta. Sed ĝi ne estis komplete preta. Laŭdire ĝi estis iuspeca bombopafilo. Tio estas tiu speco kun la stumpaj tuboj. Diametro 42 centimetroj onidire. Sed ĉiufoje la fandado de la tubo misis. Ankaŭ ĉio cetera daŭris. Sed mia patro ĉiam diris: “Se vi demandas min, ni ja sukcesos en tio, almenaŭ antaŭ ol fariĝos serioze. Aŭ, se vi pensas pri Krupp, tiu finfine vendos la umon, eble eĉ al la caro de Ruslando”.

Sed kiam fariĝis serioze, kelkajn jarojn poste, tiam ili ne vendis ĝin, sed ili nur pafis per tiu umo de granda distanco eĉ al Parizo. Ĉie oni nomis ĝin Dika Berta. Ankaŭ tie, kie neniu konis min. La fandistoj en nia urbeto estis la unuaj, kiuj donis al la umo mian nomon, ĉar mi ja estis la plej dika en nia urbeto. Tio tute ne plaĉis al mi, ke ili ĉie parolis pri mi, eĉ en regionoj, kie mi ne estis konata, sed spite mia ulo diris al mi: “Estas sen malica intenco”. Sed kanonoj neniam plaĉis al mi,

eĉ se ni vivis de tiaj aĵoj de Krupp. Kaj se vi demandas min: ne malbone vivis. Eĉ anseroj kaj kokinoj ĉirkaŭkuris en nia fabrika urbeto. Preskaŭ ĉiuj manĝigis porkon en sia ŝedo. Kaj dum printempo tiom da kunikloj ĉie.

Laŭdire ilia Dika Berta ne multe utilis dum la milito. La francoj preskaŭ mortis pro rido, kiam la umo ankoraŭfoje mispafis. Kaj mia ulo, kiun tiu Ludendorff² prenis al Landsturm³, pro tio nun estas kriplulo, kaj ni ne plu rajtas loĝi en la fabrika urbeto, sed nur en luita ĝardenlaŭbo, kie ni vivas de mia ŝparita mono, ĉiam diras: “Lasu Berta. Laŭ mi, vi rajtas eĉ ampleksiĝi. Plej gravas, ke vi restu sana”.


Tradukis el la germana lingvo
Wolfgang Kirschstein

Notoj

1. **Dika Berta** estis kanono, uzita de Germanio dum la unua mondmilito (vidu la suban foton). Kutime oni atribuas la nomon al Bertha Krupp. Berta en la rakonto de Grass estas fikcia persono.

2. **Erich Ludendorff** (1865–1937) decidis post 1916 kune kun Hindenburg la strategion dum la unua mondmilito; ili funkciis kiel diktatoroj.

3. **Landsturm** (*germane*: la popola sturmo). Speco de milicio, kies anoj ĝis la aĝo de 42 jaroj tiutempe plenumis akcesorajn servojn dum la milito.



Foje eraras eĉ Maigret

Simenon, Georges. *Maigret eraras*: Krimromano / Tradukis el la franca Daniel Luez; Antaŭparolo de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2009. — 128 p.; 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; Volumo 17).

Se en altekosta loĝejo juna virino estas trovita kun kuglo en la brusto kaj sen armilo apude, tiam ne estas banala memmortigo, sed kazo por komisaro Maigret.

Tion prave konkludas unu el la helpantoj de la polico. La viktimo, iu Louise Filon, estis antaŭe konata kiel Lulu. Tiam ŝi perlaboris sian monon kiel surstrata prostituitino. Certe tia virino ne havas la monon por pagi loĝejon en burĝa najbareco. Ŝiaj propraj havaĵoj estas modestaj kaj tute ne kongruas kun la ĉirkaŭaĵo. Certe iu riĉa adoranto pagas por la antaŭa Lulu, sed kiu? La purigistino, kiu trovis la kadavron, ne estas tro kunlaborema, ĉar ŝi malestimas la medion, en kiu tiu vivis. Cetere, ŝi estas malnova “konatino” de Maigret kaj pro tio ŝi deziras kiel plej eble malmulte da kontakto kun la polico. Saman malemon montras la pordistino de la domo. Tamen ŝi malkaŝas, ke Louise havas junan amanton, iun Peĉjon, muzikiston, kiu neniel povus pagi tiom koston apartamenton. Kial li kuris el la domo en tre malkvieta stato ĝuste je la tempo, kiam okazis la murdo? Louise estis graveda — ĉu Peĉjo estas la patro aŭ iu alia? Ĉu la murdisto?

Maigret kaj liaj kunlaborantoj sukcesas rekonstrui la fatalan vesperon. Maigret, kiel kutime, metas eron apud eron kaj finfine montriĝas, kiu murdis kompatindan Louise. Vere, finfine, ĉar nur sur la antaŭlasta paĝo Maigret sukcesas malkaŝi la identecon de la murdinto.

Estus troigo nomi la intrigon de tiu romano “streĉa”. Kiu serĉas spirhaltigajn eventojn devas serĉi aliloke. Estas distre, ja eĉ amuze legi tiun malnovmodan romanon, sen poŝtelefonoj kaj serĉoj pere de Google. *Maigret eraras* preskaŭ elvokas la etoson de la bonaj malnovaj tagoj kiam sufiĉis por komisaroj cerbo kaj intuicio.

En ĉi tiu romano Simenon, kiel kutime, liveras detalajn kaj akre observitajn portretojn. Centre estas tri virinoj, kiuj en ia maniero rilatas al la murdinto. Simenon ne bezonas multe da vortoj por aperigi la personon antaŭ nia interna

rigardo, ekzemple jen la portreto de la purigistino:

Ŝi estis tre malalta. Kiam ŝi sidis, ŝiaj piedoj apenaŭ atingis la plankon, kaj ŝi surhavis ŝuojn tro grandajn por ŝi, ŝia robo estis tro larĝa kaj tro longa. (p. 9)



La personoj ankaŭ malkaŝas sin pere de sia lingvouzo. Jenon la pordistino diras pri Louise:

— Ĉu vi bone konis ŝin?

— Ne tro. Ŝi ne restadis en mia pordistejo, nur iomete malfermis la pordon pasante por demandi ĉu ŝi ricevis poŝtaĵojn. Ŝi sentis sin ne tro komforte en tiu ĉi domo, ĉu vi komprenas?

— Vi volas diri, ke ŝi ne estis de la sama medio kiel viaj aliaj luantoj?

— Jes. <...> Mi havas neniun kialon por malbone paroli pri ŝi. Ŝi estis kvieta, ne aroganta.

— Ĉu ŝia purigistino neniam diris ion?

— S-ino Brault kaj mi ne parolas unu al la alia.

— Ĉu vi konas ŝin?

— Mi ne emas koni ŝin. Mi vidas ŝin iri supren kaj malsupren. Tio sufiĉas al mi. (p. 14)

Ĝi estas la kvina romano en la Maigret-serio de *Sezonoj*. Entute Simenon verkis pli ol 400 romanojn, do ni rajtas atendi ankoraŭ multe. Mi esperas, ke Daniel Luez, kiu ankaŭ ĉi foje trafte, fidele kaj elegante esperantigis tiun romanon, iam sentos la tenton prezenti al ni alian romanon el la ampleksa verkaro de Simenon, eble foje ion *sen* Maigret. La elekto estus granda.

Wolfgang Kirschstein

Vere malgaja historio...

Malfrua Somero (ps.). *Malgajaj sonetoj* / Antaŭparolo de Etelka Kiss-Jakupoviĉ. — Beogrado: E. Kiss-Jakupoviĉ, 2009, 80 p. — 500 ekz.

“Malfrua Somero”, t.e. serba aŭtoro kun zorge kaŝita nomo, verkis 68 “malgajajn sonetojn”. Pasis pli ol dudek jaroj post lia morto, kaj jen lia iama amikino, objekto de lia malfeliĉa amo, decidis eldoni la poemojn, ke ili ne perdiĝu, ĉar, ŝiaopinie, “Esperanto meritas ilin”, kaj “la gesamideanoj devas legi ankaŭ tiujn belegajn, sincerajn kaj kortuŝajn poemojn”.

Do, kion ni fakte ricevis?

Por ke la lingvo estu internacia... mi volis diri, por ke la versaĵo estu soneto, ne sufiĉas nomi ĝin tia. La poemetoj havas po 14 liniojn, plia simileco al sonetoj fakte ne videblas. La verslinioj estas nesolide kurtaj. Anstataŭ la kvinpieda jambo, nepra por sonetoj — aperas plejparte tripieda amfibrako, forte lamanta. Rimoj havas necesan skemon nur en la verstrioj, sed ne en la kvaroj. Kaj mem rimoj estas aŭ enuigaj adasismoj, aŭ fuŝaj “asonancoj”: “vidas-rememorigas” (p. 11), “premas-eltenos” (p. 13), “povus-volus” (kelkfoje!) ktp., por ne daŭrigi la liston, mi diros: tiaĵoj troviĝas sur ĉiu paĝo. La pinto estas sur p. 31: en unu soneto troviĝas jenaj “rimoj”: aminda-inda, tiam-iam, eblaneresanigebla. La rimo “ĝarden’-tamen” (p. 30) igas dubi, ĉu la aŭtoro ĝenerale imagas, kio estas akcento kaj ritmo...

Mi komprenas, ke la aŭtoro vere suferis (mi mem iam estis en tia stato). Tamen, por esti bona poeto, ne sufiĉas nuraj amsuferoj — necesas ja havi talenton kaj studi poezian teknikon. Kaj, memkompreneble, libere posedi la lingvon.

La vortoj — tro bombastas. Rozoj, larmoj, sendormaj noktoj... koro, kiu krevas pro doloro (estus tre strange, se tiu rimo ne aperus). Hazardan rendevuon sur parka benko (bela foto de tia benko en vintra parko ornamas la kovrilpaĝon) la aŭtoro konstante rememoras: tridek tagojn poste (p. 28-31), sesdek tagojn (p. 38); post naŭdek tagoj ŝi konsentis pri nova renkontiĝo — kaj li denove fervore verkas pri tio (p. 41-42); pasis duonjaro — jen novaj sonetoj (p. 65-66, 68). Jen li pentas, ke estis ne sufiĉe afabla kun ŝi (p. 45), tamen ŝi konsolis lin. La aŭtoro firme decidis ne plu verki sonetojn (p. 32, 34, 37, 39) —

tamen verkas plu. La soneto LVII (p. 67) estas titolita “la lasta”, sed ĝin sekvas plia deko...

Multas gramatikaj eraroj, ofte aperas superflua “la” apud posedpronomoj. Plurloke estas koŝmara vortordo: “sed” enŝovita meze de sintagmo; “ne tuŝis plu via min man” (p.20), “jen tombo gepatroj de ŝiaj” (p. 22), “kun via vin vidis amato” (p. 26), “ke malgraŭ ĉu volo sincera” (p. 40), “folioj de l’ arboj ĉar falis”, “mi sidas kun plena animo / de tristo kaj malespero” (p. 49), “aŭ junio pri mia funebras” (p. 50), “ni estis brakumo en prema” (p. 59), “hodiaŭ tre volas mi esti / soleca medito en mia” (p. 61), “mi legis okuloj kun larmaj” (p. 64) — denove, mi citas nur kelkajn el multaj ekzemploj.

Tamen, la malreciproka amo ne estas egoisma, kiel tio ofte okazas ĉe aliaj personoj. La aŭtoro komprenas, ke li neniam feliĉos. Do li nur ĝojas pro momenta rigardo, man-tuŝo, brakumo, danco... Li nenion pretendas, kaj strebas fari al ŝi bonon, senkondiĉe. Li eĉ dankas ŝian amaton, “ĉar kiun plezuron li donas, / de mi vi akcepti ne povas...” (p. 26); “prepari ĝojon / por vi — la solvo sola” (p. 21), “Kion mi, vanta, deziras? / La vivo *al vi* nun plu ridu, plezurojn de l’ vivo *vi* vidu” (p. 52), “nur veo postrestas, / ĉar al mi ne eble estas / *vin fari* homo feliĉa” (p. 54).

Vere malgaja historio... Kompatindas ĉiuj: kaj la multsuferinta aŭtoro, kies amo neniam iĝis reciproka. Kaj ŝi, kun rimorsoj, ke ŝi ne povis respondi liajn sentojn — pro feliĉa amo al alia viro kaj pro siaj moralaj konvinkoj. Kaj la leganto...

Valentin Melnikov



Bjalistokaj prezentaĵoj

Bjalostockie Studio Piosenki. Bjalistokaj prezentaĵoj: K-disko. — [Białystok]: Studio WeM K. Sypytowski, 2009.

Kiam dum la solena malfermo de la 94a Universala Kongreso de Esperanto sur la scenejon neatendite eliris simpatiaj junaj homoj kaj ekkantis en Esperanto per belaj voĉoj en estrada, eĉ iom ĵaza, maniero, tio vere aspektis kiel freŝa vento dum UK. La gejunuloj kantis tute profesie. Estis senteble, ke la kolektivo estas ne amatora. Kun granda plezuro ĉeestantoj ĝuis tiun surprizon. Bedaŭrinde, ĉio bona iam finiĝas. Do, post kelkaj kantoj la gekantistoj foriris de sur la scenejo kaj la kongresa programo plu daŭris. En riĉaj programaj artaj eventoj publiko ne povis ĉeesti ĉie, sed tiun kantantan grupon ĉiu kongresano aŭdis almenaŭ dufoje — en la solena malfermo kaj en la solena fermo. La plej feliĉaj spektis ĝin eĉ trifoje, ĉar estis ankoraŭ la sama programo de la kantgrupo dum la nacia vespero.

Bonaj, facile memorigeblaj melodioj, kantataj de la kantgrupo, allogis min jam dum la unua renkontiĝo kun ili. “Kiel bone estus denove aŭdi ilin post la kongreso”, — mi pensis. Kaj certe tiel okazis. Ŝajnas, ke la organizantoj de la UK aŭdis miajn (kaj ne nur miajn!) pensojn, ĉar, reveninte hejmen, mi trovis inter multaj aĵetoj en mia kongresa sako la diskon kun ĝuste tiuj kantoj, kiuj tiel plaĉis al mi dum la kongreso.

Dek kantoj, lokitaj en la disko, estas diversaj kaj laŭ la enhavo, kaj laŭ la humoro. Ĉar la disko estis speciale produktita por la Esperantista kongreso, la unua kanto certe estas (1) *La espero*. Poste denove laŭ certa logiko lokiĝas du kantoj pri Bjalistoko: (2) *Bjalistokaj prezentaĵoj* kaj (3) *Kio nova en Bjalistoko*. En sekva grupo de kantoj temas pri lirika sentoj de kantantoj. En ĝi sinsekvas pli rapidaj kaj dancprovokaj kaj pli malrapidaj, iuj el kiuj havas internacian ĝenran koloron — jen valsan, jen blusan: (4) *Malŝparas la knabar’*, (5) *Kiajn kolorojn uzi*, (6) *Pli da fort’*, (7) *La valsanta spegulo*, (8) *Se sento scii povus*, (9) *Bluso pri la fojna bazaro*. Kaj finas la tuton la plej (laŭ mi) populara kanto de polaj aŭtoroj (teksto de R. Ulicki, muziko de J.A. Laskowski) en brila traduko de Lidia Ligeza, kies nomo mankas en la kantlisto, sed estas en la danklisto — (10) *La bazaroj koloraj*.



Jam la produktado de la disko estas granda merito de la organizantoj de la arta programo de la UK. Kompreneble, kanti en fremda lingvo ĉiam estas malfacile. Pro tio kutime aperas fuŝa prononco “kijajn”, “mija” k.t.p., kiu en iuj kantoj iomete frapbatas la esperantistajn orelojn. Pro tio aparte agrable estas aŭdi la perfektan Esperantan prononcon en la 7a kanto (solistino P. Popławska) kaj en la lasta kanto.

Bone produktita sonregistrado (Studio WeM K. Sypytowski) kaj miksado kun postproduktado (M. Kubik) permesas al aŭskultanto ĝui belajn voĉojn, kaj bela diskkovrilo (K. Matuszkiewicz) prezentas Bjalistokon kiel lokon ligitan kun la kreinto de la lingvo kaj kun la 94a UK.

Certe, celado al perfekteco ne havas limojn. Al mi, ekzemple, mankas tekstoj kaj notaroj de la kantoj kaj fotoj de la kantistoj. Krom tio, en *La espero* novaperintaj en la melodio ĥromatismoj sonas (laŭ mi) iomete strange, ĉar ĉiuj jam al kutimiĝis al tradicia pli simpla melodio. En la kantoj 4a kaj 5a ne koincidas la akcentoj en la muziko kaj la teksto, pro kio aperas nekutimaj en Esperanto vortoj: knabino, ankaŭ, ĉiu, tagoj, steloj.

Sed malgraŭ ĉiuj mankoj mi pretas aŭskulti la diskon denove kaj denove, ĉarmita de la bela muziko, belaj voĉoj, juneca sincero kaj entuziasmo de la kantistoj.

Irina Mironova

Docento de Akademio pri korusa arto (Moskvo)

**Ne forgesu
(re)aboni!**

Sen titolo

En *Nia trezoro* ĉi-jare ni prezentos Esperanto-romanojn. La serion komencas *Sen titolo** de ruso, vilaĝa pastro Ivan Gennadjeviĉ Ŝirjaev (Ŝirjaev, 1877–1933). Ĉi tiu romano pri la lernoĵaro 1897/1898 el la junaĝo de Esperanto-pioniro kaj seminariano eble estas la plej frua romano originale verkita en Esperanto, kvankam oni eldonis ĝin nur en 1995. La suba teksto baziĝas sur la recenzo de Sergio Pokrovskij, aperinta en *La Ondo de Esperanto*, 1999, №12.

La romano komenciĝas per banala beletra kliŝo pri hazarde aĉetita manuskripto de iu nekonata “Pastro J. Ŝ....v”. Evidente oni povas legi “Johano Ŝirjaev”, sed la aŭtoro plene rajtus malakcepti tiun identigon. La ĉefa romanpersono sin nomas “Joĉjo”, al kio en la romano respondas la plena nomformo “Jozefo”, ne “Johano”.


Do, la intenco de la *Antaŭparolo* estas klara kaj sufiĉas por pardoni la kliŝon: ĝi liberigas la aŭtoron, kiu povas jen identigi kun Joĉjo, jen sin de li distancigi. Tiom pli ke jam en la unuaj ĉapitroj oni trovas sin en la serioze sincera etoso de rusa literatura verko el la epoko de Tolstoj kaj Ĉeĥov.

Ne estas mia intenco min ridindigi per apudmeto de Tolstoj kaj Ŝirjaev, tamen ... tamen ili ja apartenas al unu sama kultura tradicio, kaj la temo de *Infanaĝo*, la unua libro de Tolstoj, laŭteme iom proksimas al *Sen titolo*, eble la unua originala romano en Esperanto (en la *Postparolo* de la editoroj la leganto trovos detalan pridiskuton ĉu vere ĝi estas la unua).

Jen epizodo kiu unue pensigis min pri la *Infanaĝo* de Tolstoj:

La plej aĝa frato, kun profundpenseco kaj mokemo, tiom propraj al ĉiuj veraj instruituloj, klarigis, ke Esperanto estas unu el la t.n. artefaritaj lingvoj, kiuj naskiĝas kiel fungoj post pluvo, kaj ... mortas atentata de neniu, kaj ke artefarita lingvo estas sensecaĵo, je kiu povas interesiĝi nur stultuloj. “Se vi deziras lerni fremdan lingvon, vi lernu la lingvon germanan”, — li aldonis, — “kaj Esperanton ni lasu al stultuloj...”

Tiom konvinkiga parolo de la “instruito” tamen ne havis la deziratan efikon; kontraŭe, ĝi nur pligrandigis



la scivolon de la knabo, kiu ĉiutage aŭdis ke la frato, la onklo kaj la gepatroj nomis lin ĝuste “stultulo”, kaj tiu cirkonstanco havis decidigan signifon.

Tolstoj parolis pri “la dezerto de 1^a adolesko”; kaj Joĉjo,

Joĉjo havis karakteron kaŝeman kaj li ĝenerale nevolonte lasis scii iun pri siaj sekretoj ... nun, kvazaŭ timante ion, kvazaŭ ne dezirante, ke oni submetu al mokoj *lian* lingvon (en sia animo Joĉjo nomis la lingvon ne Esperanto sed “*mia* lingvo”, ĉar ŝajnis al li, ke krom li neniu estas kapabla inde taksi ĝin kaj ŝati), li nenion diris eĉ al la patrino.

Esperanto okupas tre gravan lokon en la romano de Ŝirjaev, kaj ĝia efiko estas duflanka. Ni jam vidis ke ĝi altiris mokojn de la prudentuloj; poste ĝi kaŭzos al Joĉjo problemojn en la seminario kie li lernas. Aliflanke, ĝi konsolas kaj kuraĝigas lian animon, kaj malfermas al li la mondojn, geografian kaj socian, pri kiaj la humila seminariano neniam pensus.

Mi ne scias kiom da vero kaj kiom da fantazio estas en la rilatoj de Joĉjo kun Olnjo Veselov kaj la grafidinoj Trubaĉev. Tamen efektive, en tiu epoko Esperanto renkontadis ne nur mokojn de la skeptikuloj sed ankaŭ simpatiojn de eminentuloj kaj altranguloj, precipe en la romantika socio rusa. (Fakte, la periodo inter 1896–1904 estis tre malagraba por Esperanto en Ruslando. La antaŭe fonditaj kluboj malaperis, kaj malaprobado de la oficialuloj sentebles ankaŭ en la romano. Ni tamen parolas pri la sinteno de la intelekta elito, pri homoj kiel grafo Tolstoj, inter kiuj tiutempe oni pli ofte renkontadis favoran aprezon de Esperanto ol nun.)

Vere mirindas, kiom facile kaj flue Ŝirjaev prezentas scenojn el la tiama rusa vivo. Oni facile rekonas la realaĵojn konatajn per la samtempaj rakontoj de Ĉeĥov, la tuta romano havas klarajn, nekonfuzible rusajn kolorojn (escepte la klasikisman *Antaŭparolon*, kies scenego povus situi ie ajn en la mondo); kaj ĉio ĉi en tre normala, bona Esperanto. Precipe interesa estas la rakonto de popolano el ĉap. 40: sen ajna vulgaraĵo leksika aŭ gramatika Ŝirjaev tre klare sentigas la popolan parolmanieron. Li ne kripligas la vortojn (rimedo tro evidenta kaj tro uzata de mallertaj verkistoj), li atingas sian celon prezentante la profundan strukturon de la popola parolo (ripetoj, manko de logikaj ligiloj ktp). Fakte tio estas ankaŭ pli adekvata al la pensmaniero de la popolano, kiu ja neniel celis aĉigi sian parolon; tutsimple li sekvis alian, popolan parolnormon.

La romano entenas multe da tiaj ingitaj noveloj, rakontatajn aŭ verkatajn de la romanpersonoj. Per si mem ili ofte estas valoraj, sed ili konsiderinde bremas la ĉefrakonton, precipe por la leganto moderna, kiun la televido kutimigis al pli efekta prezento de malpli komplikita materialo.

Tamen esperantologie la romano estas tre interesa fonto. En la recenzata eldono la lingvaĵo de la aŭtoro estas iom korektita, kaj kiom la libro gajnis en la agrablo de facila legado, tiom ĝi perdis kiel fonto de scienca studo. Tio estas vera dilemo, ĉar la esperantistoj ne estas sufiĉe riĉaj por havi *kaj* sciencan, *kaj* faciligitan eldonojn (sed eble la Interreto povus helpi?). La editoroj resumis siajn ŝanĝojn en la *Postparolo*, tamen sen preciza lokindiko; tial mi ne povus citi frazon el la romano kaj certi ke mi citas lingvouzon de Ŝirjaev (kaj ne preferon de la editoro). Mi preferus ke ĉiu vorto ŝanĝita estu en iomete alia tiparo ol la ĉefteksto (nur *iomete* alia, tiel ke la diferenco ne ĝenu la legadon, ne saltu en la okulojn — sed estu tamen konstatebla se onin ekinteresis iu lingva detalo kaj oni ekzamenas la tekston de la frazo pli atente, eventuale kun lupeo).

Tio ne estus malfacila por la nuna tipografio, eĉ tute amatora. Bedaŭrinde, la tipografia prezento de la libro estas ĝia plej grava difekto; kaj la bindaĵo estas tiom nefortika, ke ĝi rompiĝis antaŭ ol mi finis la legadon.

Tamen mi sincere dankas al la eldonojo *Pro Esperanto* kaj al la Internacia Esperanto-Muzeo de Vieno ke ili savis el la perejo kaj disponigis al la publiko tre valoran verkon de nia literaturo.

Sergio Pokrovskij

* Ŝirjaev, Ivan. *Sen titolo*: Originala romano / Edit. Herbert Mayer. — Vieno: Pro Esperanto, 1995. — 336 paĝoj. — (Plena verkaro; Vol. 3).

Sep bibliotekoj profitis el la Apogo Thorsen

Sep Esperanto-bibliotekoj baldaŭ pliriĉiĝos per libroj, kiujn ili gajnis kiel ĉi-jarajn subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Tiun ĉi specialan kason de UEA donacis en 1997 la dana Esperanto-poeto Poul Thorsen kun sia edzino Roma, ambaŭ forpasintaj en 2006. Pri la disdono decidis la estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj la ĝenerala direktoro Osmo Buller.

Entute 1200 eŭroj dividiĝis inter la beninaj kluboj *Sankta Harmonio* kaj *Monda Familio* (kune 255 EUR), Esperanto-Grupo Lazaro Luiz Zamenhof el Brazilo (113 EUR), Biblioteko Interlingvistika *Fenikso* el Venezuelo (260 EUR), Milana Esperanto-Klubo el Italio (150 EUR), Meksika Esperanto-Federacio (260 EUR), kaj Esperanto-Asocio de Angers el Francio (162 EUR). Aliajn petojn UEA ne ricevis.

La Biblioteka Apogo Thorsen donos subvenciojn ankoraŭ en du jaroj. Petoj por la sekva disdono devos atingi la Centran Oficejon ĝis 15 okt 2010. Kun la peto oni sendu liston de dezirataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

GK UEA

Furorlisto de la Bjalistoka Libroservo

Laŭ la decembra kajero de *Esperanto* (nin atingis nur la elektronika versio, ne la papera) dum la 94a UK en Bjalistoko la Libroservo de UEA vendis diversajn varojn sume por 29 000,60 eŭroj. En la unua deko estas naŭ libroj kaj unu disko:

<i>Internacia Kongresa Universitato 2009</i> (red. J.A. Vergara)	74
<i>Poŝamiko</i> (Beatrice Allée, Katalin Kováts)	50
<i>Esperanto de nivelo al nivelo</i> (div. aŭtoroj)	40
<i>Konciza klarigo pri la landnomoj en Esperanto</i> (Anna Löwenstein)	35
<i>Babiladoj de bonhumora Zamenhofano</i> (Jakobo Ŝapiro)	33
<i>Homarano</i> (Aleksander Korĵenkov)	29
<i>La jaro 2010</i>	29
<i>Ilustrita frazeologio</i> (Sabine Fiedler)	28
<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i>	27
<i>Doktoro Esperanto</i> (DVD de Mario Migliucci)	26

Nia libro *Homarano* (la plej multekosta en la furorlisto) dividis la sesan lokon kun la utila jar-agendo.

HaGo

Ricevitaj libroj

Golec, Jozefo. *Ekslibrisoj de la ĝdiniĝaj esperantistoj de laborejo de Jozefo Golec* / Tradukis el la pola Edward Jaśkiewicz, Edward Kozyra. — Sopot: [s.e.], 2008. — 9 p., il. — [Donaco de la Konversacia Esperanto-Rondo, Gdynia].

Postuła, Edyta. *Gdansko — la urbo de libereco* / Tradukis el la pola Tomasz Chmielik, Henryk Kosicki. — Gdańsk: Fundacja Centrum Solidarności, [2009]. — 24 p., il. — [Donaco de la Konversacia Esperanto-Rondo, Gdynia].

Somero, Malfruas (ps.). *Malgajaj sonetoj* / Antaŭparolo de Etelka Kiss-Jakupović. — Beogrado: Etelka Kiss-Jakupović, 2009. — 80 p. — 500 ekz. — [Recenzo-ekzemplero].

Simenon, Georges. *Maigret eraras*: Krimromano / Tradukis el la franca Daniel Luez; Antaŭparolo de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2009. — 128 p. — 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №17). — [Donaco de Sezonoj].

Verne, Jules. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*: Romano / Tradukis el la franca Jean-Luc Tortel; Antaŭparolo, notoj de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2008. — 208 p. — 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №15). — [Donaco de Sezonoj].

Республика Коми: Энциклопедия. Т. 3. — Сыктывкар: Коми книжное издательство, 2000. — 424 с., 16 с. цв. вкл., ил. — 5000 экз. — [Donaco de Anatolij Sidorov].

C. 337. Артеев А. *Эсперанто*.

Ricevitaj gazetoj

Esperanto aktuell, 2009/5; Esperanto en Azio, 2009/65; Esperanto en Danio, 2009/5; Frateco, 2009/86; Heroldo de Esperanto, 2009/13,14; Kontakto, 2009/4; La Gazeto, 2009/144; La KancerKliniko, 2009/132; La Movado, 2009/705; La Ondo de Esperanto, 2009/12; La Revuo Orienta, 2009/10; La SAGo, 2009/59; Norvega Esperantisto, 2009/5; Sennaciulo, 2009/11-12; Spiegulo, 2009/4.

Kulturo

Gazetoj

Spiegulo, Vintro 2009

La vintra kajero fermas la duan jar-kolekton de *Spiegulo*, socikultura revuo en Esperanto. La redakcia mesaĝo omaĝas al Tadeo Chrobak, forpasinta antaŭ kvin jaroj. La redakcio de *Spiegulo* konsideras lin sia spirita patro. Estas li, kiu kunfondis la faman ARKONES en Poznań, lerte gvidis en ĝi podiajn diskutojn, kaj eldonis revuon *bEdaŭrinde*.

Dupaĝa kroniko de la jaro 1989 montras, kiel malvolviĝis la eventoj laŭmonate kaj laŭlande. Per la redakcia kompilado kaj traduko prezentigas ĉefaj punktoj el la parolado de la pola politologo kaj diplomato Włodzimierz Marciniak, en ĉi-jara konferenco “*Solidareco* kaj la falo de la komunismo”. Li analizas tri grupojn de kaŭzoj de la fino de la komunismo en la Orienta Eŭropo. La vivrakonto de Robert Pontnau *Transe de la muro* bildigas personajn impresojn pri Berlino en aŭgusto 1968.

Andreas Künzli en sia eseoj *Inter cionismo kaj reformjudismo* esploras la solvojn de la juda problemoj proponitajn de Zamenhof kaj de judaj intelektuloj, kiuj agis en la vivtempo de Zamenhof. Kompletigas la eseon fragmento el libro de Florian Sokolov.

Paroladon de Leszek Kołakowski *Edukado por malamo, edukado por digno*, prezentitan ĉe la akcepto de la premio de germanaj librovendistoj en 1977, tradukis Tomasz Chmielik.

Ionel Oneț tradukis *Kelkajn notojn pri digno* de la rumana filozofo Andrei Pleșu, kiu asertas, ke “la orient-eŭropa spaco estis, inter 1945 kaj 1989, medio privilegia por la ekzercado de digno. Ĉiu vivepizodo estis testo.”

Estas anoncita baldaŭa apero de *Podlaĥia Antologio*, kies ideo naskiĝis dum la literaturaj aranĝoj en la Bjalistoka UK. En ĝi oni trovos poeziaĵojn de preskaŭ sepdek aŭtoroj el la naskiĝregiono de Zamenhof. *Memoro* de Jan Leńczuk (tradukis Tomasz Chmielik) aperas kiel gustumo de la antologio.

Subskribite “la redakcio” en la rubriko *novaj libroj* estas analizataj kelkaj lastatempe aperintaj libroj pri la historio de Esperanto. Tomasz Chmielik tradukis recenzon de Bogusław Bakula pri la anglalingva *Konciza enciklopedio de la originala literaturo de Esperanto* de Geoffrey Sutton, kiun publikigis pollanda faka revuo.

HaGo

Por la taskoj de la novembra kajero de LOdE venis naŭ respondoj, el kiuj sep estas ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Jindřich Tomášek (Ĉeĥio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Mirosława Kubicka (Pollando), Svetlana Konjašova (Ruslando), Birgitta Anevik (Svedio).

La loto donis libropremion al **Jindřich Tomášek**. Ni gratulas lin!

La ĝustaj respondoj

Ŝarado: strigo

Kvarliteraĵoj: beno, keno (kano), peno, reno, veno

Glora viro: Zamenhof

Magia figuro: akv', sklav', val'.

Silaboj: sako, loko.

Divenu metion: vendisto.

Sudoku

		7		4			9	5
	9	4	3			7	6	
			8					
	5			6	8		3	7
4	8						5	2
7	3		5	2			4	
					6			
	7	3			4	5	8	
1	4			8		6		

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per ciferoj de 1 ĝis 9, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en kvadratoj 3×3 la nombroj ne ripetiĝu.

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de februaro 2010.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

Juda humuro

Israela limonado

Internacia firmao decidis reklami sian limonadon en Israelo. Ili preparis grandegan belan ŝildo-reklamon, kiu konsistis el la jenaj tri "kronologiaj" bildoj, kiuj aperas unu apud la alia:

La unua bildo: Viro kuŝas en suna tago sur la plaĝo de Tel-Avivo, senforta kaj duonsvenanta.

La dua bildo: La sama viro trinkas tiun limonadon.

La tria bildo: La sama viro plene refreŝiĝinta kaj energiplena.

Post kelkaj tagoj telefonas la brita ĉefdirektoro de la firmao al la reprezentanto en Tel-Avivo, ankaŭ brito: "Nu, kiaj estas la rezultoj de nia reklamado?"

Respondis la brito: "Mi bedaŭras, sed ni forgesis, ke la judoj legas de la dekstra flanko maldekstren..."

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Drakula dinamismo

Protestanta Etiko... Dinamismo, Sangemo, Konkuremo, Konkeremo (Lee Chong-Yeong. *Kapitalismo kaj Konfucea Kulturo* // Lee Chong-Yeong, gvidanto nia. Korea E-Asocio, 2009, p. 177)

Loke, preme, persone, aŭ: Triĉambra hotelo

300 tranoktaj lokoj en unu kaj du personaj ĉambroj (Flugfolio de Hotel Brda Bydgoszcz)

Universala fortoperdo

Kampanjo de la Infanoj por Senforta Mondo (<http://topsy.com/tb/www.edukado.net/anoncoj/23016>)

Senlange? Dronante ĝis la skroto?

Wykaz skrótów / Listo de mallangigoj (Titolo en: Grzegorz Waligóra. *Kvardek jaroj en opozicio: Politika biografio de Adam Pleŝnar*. Wrocław: Silezia Esperanto-Asocio, 2009, p. 88)

Bizarulo en Peruo

Mi ankaŭ vizitis Machu Picchu... Mi estis tre kurioza... (Ŝandor Monostori. *Meminstrua esperantisto en Peruo* // *Esperanto sub la Suda Kruco*, 2009, sep., p. 16)

Sondoj al plena posedo

<...> mia libro "Lingvaj Resondoj por ĝuste uzi Esp.on" (Marcelo Leereveld. *Laŭte*, №203, sep.-okt., p. 32)

Elektrizitaj, aŭ: La UK nin reŝargis

Prezentita en la urbo Bjalistoko (Pollando) okaze de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto. (*Jura Tribuno Internacia*, 2009, №8, p. 56)

Nerezignebla Glebo

Solidare al Joe Brazilio, brazilana reĝisoro de la didaktika filmo Gerda, mi ne povas rezigni pri la bedaŭrinda maniero recenzi de Glebo Malcev. (Jozefo Lejte. *La Ondo de Esperanto*, 2008, №7, p. 14, reage al la recenzo *Kiom merda estas Gerda...* de Glebo Malcev)

"Sed en alia universo ternas..."

Estus bone, ke afrikanoj regule montru afrikajn beletraĵojn al la cetera mondo <...> jam ni klopodas ion fari tiuterne <...> (Gbeglo Koffi, citita de Penny Vos, <http://groups.yahoo.com/group/esperantoaustralia/message/5013>, 9 okt 2008)

István Ertl ĉi-monate plu-plukis plukajojn ekskluzive de Ionel Onet

Gajan Kristnaskon!
Bonan jaron 2010!

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

Aŭstrio: Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

Pollando: PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Ĉinio: 26 nov en la Lernejo por Profesiaj Studoj de Foshan estis prezentita nova Esperanta flago. Ĉirkaŭ cent gelernantoj de tiu lernejo partoprenas la kurson de Esperanto, gvidatan de Augusto Casquero, kiu instruas en la lernejo ankaŭ la hispanan lingvon por 50 gelernantoj. (*Augusto Casquero*)



Hungario: Meze de oktobro en Miskolc renkontiĝis kadre de la projekto Komenio (vd. p. 5), lernantoj (kelkaj kun gepatroj) kaj instruistoj el la lernejoj Bar Hill (apud Kembriĝo, Britio), Nicolai (Herzberg am Harz, Germanio) kaj Komlóstető Miskolc (Hungario). (*Foto de ICH*)



Brazilo: Eĉ en Marakanao mem (Estádio do Maracanã), la plej granda stadiono de Brazilo, mirindaĵo de l’ futbala mondo, oni povas vidi nian standardon danke al la teamo *Esperanto por la publiko* (vd. p. 8), kiu senlace informas pri la Internacia Lingvo en Rio-de-Ĵaneiro. (*Evandro Caboclo*)

HISTORIO

DE ESPERANTO



Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*
Serio *Scio*, Volumo 5
128 paĝoj, 12 eŭroj

Mi estas homo



Originalaj verkoj de
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*
Serio *Scio*, Volumo 6
288 paĝoj, 24 eŭroj

HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*
Serio *Scio*, Volumo 8
320 paĝoj, 27 eŭroj

Aleksander Korĵenkov



ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5
16 paĝoj, 3 eŭroj

Mendu en via kutima libroservo